



ESPERANTO

JUNIO 1963

56a Jaro - N-ro 691 (6)

esperanto

REVUO INTERNACIA

JUNIO 1963

56 a JARO

N-RO 691 - (6)

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion por redakto oni sendu al la Centra Oficejo.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando, Telefono: (010) 3 27 88. Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Nieuwe Binnenweg 460-462, Rotterdam-6, Tel. (010) 5 66 45

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesitaj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon al nia redakcio.

Jara abono (1963): 11,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro 15,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 84 landoj.

Estraro de U.E.A. :

Prof. D-ro Hideo Yagi, prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes O.B.E., vic-prezidanto, 38 Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

D-ro André Albault, estrarano pri kulturaj aferoj kaj kongresoj, 8 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro Z. Czuba, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odynca 73/100, Warszawa, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

S-ro Sv. Ziegler, helpa sekretario, Kystvej 10, 2 th., Aabenraa, Danlando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 9081.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 6/57, Svislando.

FRONTPAĜA BILDO:

Sur Danubo: ekskursocelo de la 19-a Internacia Junulara Kongreso (p. 117)

Enhavo

Lernejoj: Stato kaj Perspektivoj

(Lapenna) 101

Simpozio: La Nova Generacio 102-9

Esperanto en Radio Zagreb dekjara

(E. Lapenna) 110

"Teknika Progreso" (Sadler) 111

Grava riĉigo de la Biblioteko 112

Rubrikoj

CED 112

Novaj Libroj 113

Ricevitaj eldonaĵoj 114

Laŭfake 115

Tra la Mondo 115

48-a U.K. Sofio 116

19-a TEJO-Kongreso 117

Esperantista Vivo & Nekrologo . . . 117

Radio 117

Memoriga Kalendaro 118

Oficiala Informilo 118

Internaciaj Konkursoj 118

Ŝaka rubriko 119

Anoncetoj 119

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa marĝeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

Plenumante la punkton 21 de la Dua Baza Laborplano, kiu rilatas al la vastigo de la instruado de la Internacia Lingvo en la lernejoj, UEA intensigis la agadon sur tiu kampo. La landaj asocioj kaj ILEI ricevis plurajn cirkule-rojn kun konsiloj kaj sugestoj pri entreprenotaj paŝoj. Estis nomitaj novaj komisiitoj aŭ komisionoj en diversaj landoj. La Organiza Komitato de la Beograda Konferenco, kiu okazos de la 28-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto sub la aŭspicioj de UEA, ricevis ĉian eblan helpon por plena sukcesigo de tiu grava aranĝo. Nova projekto de Interŝtata Konvencio pri la Paralela kaj Laŭgrada Enkonduko de Esperanto en la Lernejojn estis sendita por pristudo kaj pritrakto al ĉiuj landaj asocioj, resp. al la landaj komisionoj kaj komisiitoj.

Paralele, CED entreprenis pere de sia kunlaboranto s-ro D. Kennedy novan enketon pri la instruado de la Internacia Lingvo en la lernejoj. La nove fiksita lasta limdato por la respondoj estas la 15-a de junio kaj tutcerte ĝis tiam alvenos ankoraŭ sufiĉe multaj informoj. Tamen, estas eble jam nun diri, ke, laŭ la respondoj ricevitaĵoj ĝis la 30-a de aprilo, Esperanto estas instruata en tiu ĉi lerneja jaro en 398 lernejoj de 32 landoj al 12.533 gelernantoj. El Jugoslavio entute respondis ĝis tiu dato nur 27 lernejoj, en kiuj la lingvo estas instruata al 541 gelernantoj. Laŭ la raporto de Jugoslavia Esperanto-Ligo de la 23-a de marto, la lingvo, tamen, estas instruata entute en 139 lernejoj al 3.562 gelernantoj. Tio signifas, ke Esperanto nun estas instruata en Jugoslavio en 112 lernejoj kaj al 3.021 gelernantoj pli ol montras la statistiko de CED ĝis la 30-a de aprilo. Do, tutcerte Esperanto nun estas instruata minimume en 510 lernejoj de 32 landoj al 15.554 gelernantoj, kompare kun 471 lernejoj de 27 landoj en la lerneja jaro 1961/1962, kaj kompare kun 340 lernejoj de 27 landoj (13.009 gelernantoj) laŭ la statistiko farita por la jaro 1959/1960. Senduba progreso, kiu tutcerte montriĝos ankoraŭ pli granda je la fino de la enketo.

Por priparoli la novan situacion kaj la formojn de plua agado, kiujn ĝi diktas, mi partoprenis la 31-an de marto la kunsidon de la Konsilantaro de UEF en Parizo dum la diskuto pri la lernejoj. Poste mi veturis al Grésillon kaj havis la okazon persone konstati la progreson, kiun atingis kvindekda gelernantoj, multaj el porinstruistaj seminarioj. Ankaŭ la prelego de s-ro Ribot kaj la konversacioj kun la komisiito de UEF por la lernejoj, s-ro R. Blanc, estis tre utilaj por pli bona orientiĝo. La printempa kunsido de la Estraro denove pritraktis la tutan

demandon, kaj tiun punkton de la tagordo ĉeestis s-roj Jaumotte (Belgujo), Korff kaj Winkel (Nederlando), kiuj detale prezentis la situacion en siaj landoj. La samon faris s-ro Czuba rilate al Pollando. En Kopenhago okazis konferenco inter la reprezentantoj de CDEL s-roj Søgaard-Hansen (prezidanto), Erling Knudsen (komisiito), s-ro E. Malmgren, s-ro Sven Ziegler kaj mi mem, dum kiu ni dediĉis tute apartan atenton al la estonta agado en Danlando.

En la estonta laboro sur tiu ĉi kampo ni antaŭvidas unuavice la vastigon de la instruado laŭ la ekzistantaj leĝoj en diversaj landoj kaj la akceptigon de similaj favoraj leĝoj en landoj, en kiuj ankoraŭ ne ekzistas eblecoj por instruado de la lingvo en la lernejoj. La celo devas esti: atingi, ke Esperanto fariĝu ekzamena objekto, egala al aliaj lingvoj. La ideo de "Esperanto kiel baza lingvo" estos plue atentata laŭ la cirkonstancoj, kie ajn utile. La plano de Interŝtata Konvencio evoluos paralele. Por antaŭenigi ĝin necesos utiligi la Beogradan Konferencon, similajn konferencojn en la sekvantaj jaroj kaj la Rezolucion de UNESKO de 1954. CED povos doni multflankan helpon. Grava punkto en la programo de la estonta agado estas la oficialaj kontaktoj kun la neesperantistaj instruistaj organizaĵoj kaj la aktivigo de la instruistoj-esperantistoj en ili. Tio tute speciale rilatas al la instruista mondorganizaĵo, WCOTP, kaj ĝiaj sekcioj. Kunligi la gelernantojn per korespondado, subteni la bonegan laboron de s-ro Erbeta, grandigi la nombron de interlernejaj rondoj de "Grajnoj en Vento", krei lerneajn Esperanto-grupojn, aligi la pli aĝajn gelernantojn al TEJO — ĉio ĉi estas tasko de la respondecaj geinstruistoj, de ILEI kaj la geinstruistaj organizaĵoj. Publikigo de taŭga, almenaŭ kvaronjara lerneja gazeto, estas urĝa bezono kaj espereble tre baldaŭ estos trovita solvo ankaŭ por tiu demando. Objektiva kaj altnivela informado pri la Internacia Lingvo, tute speciale en instruistaj kaj pedagogiaj periodaĵoj, estas esenca kondiĉo por favorigo de la publika opinio kaj sukcesigo de la tuta agado. S-ro E. Malmgren prenis sur sin la tutan laboron rilate la neesperantistajn profesiajn organizaĵojn de geinstruistoj, dum la subskribinto okupiĝos pri ĉiuj aliaj klopodoj.

Ni ambaŭ esperas ricevi plej efikan helpon de ILEI kaj ĝiaj sekcioj, de la landaj asocioj kaj de ĉiuj geinstruistoj. Se tiu espero realiĝos, ankaŭ nia planita laboro efektiviĝos.

Ivo Lapenna



Problemoj de Tejo

**Marek W.
Pietrzak**

Marek Pietrzak estas polo, loĝanta en Toruń. Li estas samtempe Ĝenerala Sekretario de TEJO kaj ĝia estrarano pri kontaktoj kun orienta Eŭropo kaj pri junularaj delegitoj de UEA.

Junulara organizaĵo, por allogi la junularon, devas disponi pri multaj rimedoj. TEJO disponas pri unu grava rimedo: Internaciaj Junularaj Kongresoj. La Kongresoj tamen, kvankam belaj kaj de jaro al jaro pli imponaj, postulas fortostreĉon kaj financajn rimedojn kaj multaj gejunuloj, precipe de malproksimaj landoj, ne povas partopreni ilin. Necesas do helpi al la junularo en realigado de ĝiaj fakaj intereso, en kultura agado, en edukado kaj amuzo, mal-longe: en ĉiuj sferoj de praktikaj utiloj. Tio ĝis nun ne okazadis en TEJO. TEJO ne staris ankaŭ ĝis nun en la vico de la internaciaj junularaj organizaĵoj, same LS en la vicoj de la koncernaj landaj organizaĵoj junularaj. Tio estas grava manko en la realigado de niaj celoj. TEJO kaj LS vivis baritaj de la organizitaj junularaj medioj, trafis nur individuojn, dum la grandaj organizitaj fortoj propagandaj, administraj kaj financaj vane atendis, kiam ili povos esti utiligitaj por la disvastigo de Esperanto. Tio ne estis nia eraro. Ni simple senfortaj ne scipovis fari konvenan paŝon kaj interparoli kun aliaj sen montri konsiderindan kvanton da membroj, sen financaj rimedoj, posedante kiel ununuran armilon — proponon, ke ni portas solvon de la lingva problemoj! Dum multaj jaroj ni restis solaj sur la batalkampoj, konvinkadis unuopulojn anstataŭ troviĝi en la landaj junularaj komitatoj arigantaj diversajn junularajn movadojn. Hodiaŭ ni scias, ke ĉiu organizaĵo, kiu deziras respondi al aspiroj de la hodiaŭa junularo, devas kunlabori kun aliaj junularaj fortoj, konservante samtempe sian apartecon kaj estimante apartecon de aliaj organizaĵoj. Manko de tiu kunlaboro estis unu el la faktoroj, kiu malhelpis nian kreskon kaj evoluon.

Kiel la legantoj scias, la jaro 1963 estas deklarita Jaro de la Junularo. Por doni al la vasta membraro superrigardon pri la junulara agado, kaj por plenumi punkton 1/d de la Laborplano de TEJO, ni prezentas en la sekvantaj paĝoj la opiniojn, esperojn kaj projektojn de la Nova Generacio de Esperantistoj.

Krom tiuj plej gravaj obstakloj en la evoluo de TEJO aparte staras pure organizaj problemoj. Ĉiuj internaciaj junularaj organizaĵoj laboras en periodoj du- aŭ tri-jaraj kaj havas membrojn ĝis la 30-a jaraĝo. La Estraro de TEJO estas elektata ĉiujare kaj la membroj ne povas havi pli ol 25 jarojn. Ofte malkonforme al tiuj reguloj agas la Landaj Sekcioj, kiuj tre bone sentas, ke la reguloj de TEJO malebligas facilan, seninterrompan evoluon de la agado, firmigadon de la tradicio ege grava en la junulara organizaĵo, malebligas seriozan kaj profundan edukadon de la membraro, dum TEJO bezongas spertajn gvidantojn; kreskas nombro da diversaj problemoj, kiujn la nuna gvidantaro ne scipovas solvi mem.

Sendepende de kiu pozicio ni rigardas nian Organizon, ĉiam ni havas unuflanke la gvidorganojn de UEA kaj aliflanke la Landajn Asociojn. Tio, ke en diversaj landoj fondiĝas junularaj sekcioj ĉe LA kaj tio, ke nun ni havas JUNULARAN JARON atestas, ke TEJO ĉiam pli renkontiĝas kun kompreno kaj helpo, scipovas influi ambaŭ flankojn. Tamen por plene konstante kreski kiel edukejo de novaj organizantoj kaj gvidantoj, forĝejo de modernaj ideoj akcelantaj larĝskalan evoluon de la Esperanto-Movado, TEJO devas liberiĝi de ĉiuj plej gravaj obstakloj. La membroj de TEJO malrapide transiras al la Landaj Asocioj, al la fakaj asocioj (ĉu ili neniam rimarkis tion), al la gvidorganoj de UEA. Utiligante tiun vojon TEJO povas venki tiujn obstaklojn post multaj, multaj jaroj; ĝi povas venki ilin baldaŭ en atmosfero de kompreno kaj ĉiurilata helpo de ambaŭ flankoj. En la dua kazo la plej grava — sen troigo — problemoj de la Esperanto-Movado estos solvita kaj rezultoj ne longe sin atendigos.

La jaro 1963 estas JARO de la JUNULARO en la ESPERANTO-MOVADO. TEJO etendis sian manon, prezentis taŭgajn formojn de kunlaborado sur la loka, landa kaj internacia niveloj. Ĉu ni rajtas esperi, ke TEJO baldaŭ enpaŝos sur pli facilan vojon?

La Tejo-Kampanjo pri la Neesperantistaj Internaciaj Junularaj Organizaĵoj

Günther Becker

*Prezidanto de TEJO kaj Estrarano
pri Kongresoj kaj kontaktoj kun
internaciaj junularaj organizaĵoj;
germano.*

La Statuto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo antaŭvidas interalie, ke la Organizo celas plifortigi la interkompreniĝon kaj la amikecon inter la tutmonda junularo pere de la disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto inter la junularo kaj la praktika utiligo de ĝi je la servo de la junularo.

Same kiel la lokaj grupoj kontaktu la aliajn junularajn organizaĵojn, la Landaj Sekcioj de TEJO la landajn neesperantistajn junularajn asociojn, la internacia organizaĵo devas ligi kontaktojn kun la aliaj internaciaj junularaj organizaĵoj. Jam de la komenco de la ekzisto de TEJO kiel junulara sekcio de UEA ĝi prilaboris tiun gravan kampon kaj unu du Estraranoj daŭre okupiĝis pri la Organizaĵoj kaj speciale pri ties internaciaj manifestacioj. Estus tro longe detale priskribi ĉiujn entreprenojn. Mi nur menciu ilin kaj raportu pri la spertoj. Nia mortinta amiko Paul Ciliga ĉefe okupiĝis pri junularaj organizaĵoj kun sidejo en Parizo, abunde informis ilin pri la Internacia Lingvo kaj ĝia taŭgeco en internaciaj rilatoj kaj reprezentis la Estraron de TEJO dum diversaj internaciaj renkontiĝoj. Gian Carlo Fighiera iniciatis la proponon de interŝanĝo de la Statutoj. Pro tio la Statuto de TEJO kun akompana cirkulero estis tradukita en plurajn naciajn lingvojn, oficialajn lingvojn de la koncernaj organizaĵoj. Nikolaj Nikolov dum pluraj jaroj prilaboris la kampon unue pri la organizoj kaj ties kongresoj kaj poste nur pri internaciaj neesperantistaj junularaj renkontiĝoj. Daŭre ankaŭ la Prezidanto kaj la Ĝenerala Sekretario helpis same kiel nature la Estrarano pri Informado.

Kiaj estas la ĝisnunaj spertoj kaj atingoj? Krom la fakto, ke la publikigo de informoj pri TEJO en diversaj publikigaĵoj en plej taŭga formo kontribuis al la envicigo de TEJO inter la gravajn internaciajn junularajn organizaĵojn, ankaŭ ĉiuj aliaj agadoj kiel cirkuleroj, flugfolioj, salutleteroj al kongresoj, personaj kontaktoj, reprezentiĝo ĉe internaciaj renkontiĝoj, artikoloj en presorganoj ktp. estis grandparte pozitivaj. Grave helpis kelkfoje Landaj Sekcioj ekzemple Junularo Esperantista Brita sendante anglalingvan raporton pri la TEJO-


Kongreso en Wokingham interalie ankaŭ al la junularaj organizoj. La raporto kun la konkludoj de la lasta Seminario de Germana Esperanto-Junularo estis disvastigita pere de la Internacia Gazetara Servo de UEA.

Tamen ne ĉio povis havi plenan sukceson kaj nur daŭra studado de ĉiuj haveblaj materialoj kaj utiligo de la spertoj en estonteco povos alporti pli grandajn rezultojn. Ni devis konstati, ke ekzemple cirkuleroj estas ofte ne sufiĉe priatentataj. Do la taŭga maniero por ekpreni kontakton estas letero en unu el la oficialaj lingvoj de la organizo. Se tia letero nur intencas informi pri TEJO kaj rekomendi enkondukon de Esperanto, ĝi estas same vana kiel simila cirkulero. Ĝi enhavu kaj informojn kaj peton pri reciproka informado (por kolekti materialon por preparo de prelego dum la 8-a Internacia Junular-Kunveno de Germana Esperanto-Junularo, kiu parte okupiĝos pri tiuj problemoj, mi skribis al la internaciaj junular-organizaĵoj samtempe proponante kunlaboron en komuna studado de la lingvaj malfacilaĵoj.

Oni ne imagu, ke la internaciaj instancoj de iu ajn organizaĵo povus facile enkonduki Esperanton, eĉ se ili volus. Ili plene dependas de la regularoj pri lingvouzo kaj tiurilate de la Landaj Sekcioj, ĉar nur tiuj havas en kelkaj organizoj la rajton por fari proponojn akceptotajn de la Konferencoj kaj Estrarkunsidoj kaj plenumotajn poste pere de la koncernaj instancoj. Ni vidas do la gravajn taskojn de niaj Landaj Sekcioj.

Jus hodiaŭ la Sekretario de grava internacia junulara organizaĵo informis min responde al mia lasta letero, ke lia organizo intencas ekzameni la dokumenton transdonitan per reprezentanto de unu el niaj landaj sekcioj konsente kun la landa sekcio de la organizo mem, ke alia dokumento estos preparita kaj prezentita al unu el la Komisionoj de la Plenuma Komitato dum la venonta kunsido.

Mi ne volas mencii la nomon de la organizo, ĉar mi esperas, ke ĝis la apero de tiu ĉi artikolo estos similaj atingoj ĉe aliaj junularaj organizaĵoj. Tio montras, ke la Jaro de la Junularo alportos bonajn fruktojn ankaŭ sur tiu kampo.



*Humphrey Tonkin estas nun kasis-
to de TEJO, antaŭe estis sekretario
de ĝia brita sekcio JEB. Li estas
anglo kaj studas en Usono.*

**Humphrey
Tonkin**

La Dinamiko de la

Oni apenaŭ povus nomi la historion de la Esperanto-movado historio de *konstanta* progreso. Se okazis antaŭeniroj, okazis ankaŭ retiriĝoj; kaj se finfine ni progresis, markas nian vojon cent malsukcesoj.

Tia historio de multekosta sukceso estas neevitebla ĉe ĉiu ajn aktiva volontula movado. Kiam mankas devigaj direktivoj de iu centra instanco (kiajn ĝuas ekzemple komerca aŭ profesia entrepreno), laŭnecese estas iu manko de direktosento, iu kresko kaj malkresko de entuziasmo, kaj ofta preterlaso plene profiti el ĉiu sukceso.

Ĉi tiu iome zigzaga progresado estas pro pluraj kialoj aparte evidenta ĉe la junularo. Apenaŭ necesas denove emfazi ke la junularo ne estas iu "fako", ke ĝi ja estas vivetapo tra kiu ĉiu persono pasas. Sed malmultaj esperantistoj — kaj ankaŭ ĉiuj niaj asocioj estas miaopinie ankoraŭ mankaj ĉi-rilate — vere komprenas ke precize la portempeco de la stato de juneco igas laboron ĉe la junularo duoble pli malfacila ol en la ĝenerala movado.

Se volontula organizo dependas tiomgrade de individua entreprenemo, logike sekvas ke la plej valora rutina laboro (kaj sub rutina laboro mi inkluzivas ĝeneralan organizadan laboron) estas farata de tiuj kun konstanta kvanto da libera tempo, en neŝanĝiganta vivmedio kaj en regula okupo. Ili povas krei iluzion de daŭro en tiu aŭ alia organizo simple per laboro en la organizo konstante dum kvardek jaroj.

La junularo ne ĝuas tian avantaĝon. Plej multaj junaj esperantistoj — almenaŭ tiuj kun organiza talento — estas studentoj aŭ universitataj diplomitoj. Kaj tiaj homoj entute ne havas konstantan kvanton da libertempo por dediĉi al la movado. Ekzamenoj, la psikologiaj kaj emociaj streĉoj de komenco de kariero kaj de fianĉiĝo kaj edziĝo, militservo, translokiĝo — ĉiuj ĉi estas infliktoj speciale junularaj. Neniu junulara organizo, laŭ propra difino, povas

daŭri kvardek jarojn sen ŝanĝo de estro. Fakte, tre malmultaj tiel daŭras eĉ *tri* jarojn.

La portempa karaktero de juneco, do, postulas ke la aparte malfacila procedo de ŝanĝo de estroj okazu pli ofte en junularaj organizoj. Kiel ankaŭ ĉe ĉiuj fakaj organizoj (mi kuraĝas tiel opinii) kaj kiel ĉe plejparto de lokaj grupoj, junularaj organizoj (inkluzive de TEJO kaj ĉiuj ties sekcioj) dependas por la propra ekzisto de malgranda aro da homoj, kelkfoje eĉ unu homo. Tre ofte la estroj de tiuj organizoj plendas pri precize tiu ĉi fakto — en TEJO mem, en STELO, en la TEJO-sekcioj de Britujo kaj (lastatempe) Germanujo, ekzemple. Kaj tre ofte, se oni ne povas trovi kompetentan posteulon por la posteno de sekretario aŭ prezidanto, la organizo simple disfalas: tiome gravas unusola persono!

Kvankam oni povus diri ke la junularo havas la vervon kaj entuziasmon kiuj nepras ĉe bona estro, oni ankaŭ ne forgesu ke la junularo estas naiva kaj sensperta. La estroj de tiu aŭ alia loka grupo estis eble esperantistoj dum tridek jaroj. La kutima junulara estro, tamen, estis esperantisto jam nur du aŭ tri jarojn (tri el la kvin estraranoj de la usona TEJO-sekcio, ekzemple, eklernis Espranton antaŭ malpli ol du jaroj, kaj kvar neniam ĉeestis internacian kongreson; en simila pozicio estas la nuna redaktoro de *Kial Ne?*, kaj tiel plu). Lia organiza sperto estas preskaŭ neekzista; li ne bone konas la staton de la movado, kaj li estas sen personaj kontaktoj. Kion faras TEJO por helpi lin? Nenion. Ĝi mem devas batali por vivi — denove kun manpleno da sporadaj helpantoj. Eble li ricevos de ĝi kelkajn kuraĝigajn vortojn, sed tio estas ĉio. Ne multon pli li povas atendi de sia landa asocio, kiun li tre neverŝajne persvados doni al li pli ol kelkaj helpaj bankbiletoj kaj amika beno, kaj kiu ĉiuokaze opinias ke "oni donu al la junularo tiel multan liberecon kiel eble".

Tiu ĉi opinio ke "oni donu al la junularo liberecon" iom post iom strangolas la esperantistan junularan movadon. Junaj esperantistoj mem estas multrilate kulpaj pro tio. Ili konstante neglektis studi la problemon de trovado

Junulara Movado

de estroj kaj organizan teknikon, ili neglektis formuligi siajn ideojn pri la temo aŭ skribe transdoni al siaj posteuloj siajn proprajn spertojn. TEJO nek produktis nek disponas iujn ajn dokumentojn kun konsiloj al novaj junularaj estroj, kaj ĝi havas neniun aparaton por helpi al iliaj unuaj paŝoj aŭ pretigi ilin por estonta agado.

Sed nerespondecon flanke de la junularo kontraŭpezas nerespondeco flanke de la ĝenerala movado. Precipe TEJO kaj ĝiaj sekcioj bezonas kaj sopiras stabilecon kaj la sola metodo atingi tiun stabilecon estas:


- per konstanta akumulado de antaŭaj spertoj
- per la ekzisto de regula internacia junulara gazeto en Esperanto
- per taŭga kaj adekvata trejnado de junularaj estroj kaj provizado de konsiloj
- per senhezitaj interesiĝo kaj kunlaborado flanke de UEA kaj la landaj asocioj.

TEJO kompreneble ja bezonas monon, kaj ni ĉiuj bonvenigas la fakton ke UEA lastatempe duobligis sian subvencion al TEJO, sed tiu subvencio estas ankoraŭ neadekvata. Tio ne signifas ke TEJO deziras pli da bankbiletoj. Ja ne. TEJO bezonas pli ol ĉio ajn alia profesian helpon. Mi estas konvinkita ke se eblus dediĉi la tempon de unu persono ĉe la Centra Oficejo sole al junularaj aferoj, tiam kaj nur tiam Esperanto povus atingi sukcesojn en neesperantistaj junularaj organizoj internaciaj, tiam kaj nur tiam la naciaj TEJO-sekcioj povus vere senti sin parto de la gepatra organizo kaj tiel materie kaj morale profiti el la pli granda stabileco, tiam kaj nur tiam la esperantista junularo povus vere efiki ĉe la movado kaj la ekstermondo.

Eble kiel buboj kaj geamantoj ni sopiras la lunon. Ni komprenas la grandecon de la problemoj de UEA kaj la landaj asocioj; sed tiuj problemoj estas niaj problemoj, kaj ni petas la rajton komune labori al komuna solvo — ne sendepende nek senidente, sed laŭ vera spirito de kunlaboro. Jen la vojo al stabileco kaj konstanta progresado.

Germano, kunfondinto de Germana Studenta Esperanto-Ligo. Loĝis en Kanado kaj Sovetunio.

**Frank
Kunze**



Problemoj kaj Metodoj de la Studenta Movado

Dum la lastaj du jaroj la Esperanto-studenta movado fortiĝis. Kvankam tio estas ĝojiga fakto, la Esperanto-agado inter la studentoj kaj ĉe la universitatoj kaj altlernejoj ankoraŭ ne estas kontentiga.


Unu problemo estas la fabelo de la studenta ne-interesiĝo pri Esperanto, "ĉar la studentoj devas tiel labori por la studado, ke ili ne havas tempon por flankaj okupoj". Se oni demandas tiujn fabelrakontantajn amikojn el nia movado, kion ili faris por ekscii la supre menciitajn faktojn, ili respondas jene: "Ho, mi parolis kun multaj studentoj pri Esperanto, sed neniun interesiĝis." La vero estas ofte, ke ili nur kun 10 aŭ 15 iomete diskutis kaj pro tio konkludas malkorekte.

La spertoj el multaj landoj montras, ke inter po 2.000 buŝe aŭ per varbilo alparolitaj studentoj minimume unu interesiĝas pri Esperanto. Se la universitato havas 10.000 studentojn, tio jam estas minimumo de 5 interesitoj. Tio estas bona bazo por komenci malgrandan rapidkursion kaj poste fondi studentan Esperanto-klubon.

Sed oni devas labori por atingi ion. Per si mem ne enkondukiĝas Esperanto inter la studentoj!

En multaj landoj tute ne ekzistas Esperanta studenta movado. Estas nur kelkaj studentaj Esperanto-kluboj kaj ie kaj tie iu studenta izolulo. La kluboj ofte disfalas kelkajn jarojn post la fondo, ĉar la fluktuado de la studentoj estas granda de universitato al universitato.

La metodo por la solvo de tiu problemo estas la fondo de studentaj Esperantaj landaj ligoj kun centra kartaro kaj centra helpo al malfortaj kluboj kaj izoluloj. La fonditaj landaj ligoj laŭeble aliĝu al STELO (Studenta Tutmonda Esperanto-Ligo).



**Ivo
Osibov**

Ivo Osibov estas jugoslaviano, jam dum du apartaj periodoj redaktoro de la rubriko de TEJO: "La Juna Vivo".

La Komitato de TEJO dum la Internacia Junulara Kongreso en Ystad decidis ek de Januaro 1964 eldonadi internacian junularan gazeton. Tiu ĉi aŭdaca decido elvokis entuziasmon unuflanke, sed aliflanke tro skeptikajn komentojn. Kio motivigis la nepripensitan konkludon? Kiu gvidos la komplikan entreprenon kaj kiu plenumos ĉiujn taskojn kiuj ĝin akompanas? De kie oni akiros rimedojn por eldonado? Kiu, fine, legos la gazeton?

Pri unu fakto estis facile interkonsenti: el la gazetoj aperantaj en la Internacia Lingvo apenaŭ ni povus elekti iun, kiu altiras atenton de simpla homo lerninta Esperanton pro ĝia praktika uzeblo. Tamen, plimulto de Esperanton parolantaj personoj estas nek movadaj gvidantoj, nek alte kvalifikitaj intelektuloj, sed la plej simplaj, ĉiutagaj homoj. Precipe la junan parton de tiu grupo interesas ĉu ie morgaŭ eble eksplodos milito, kia estas vivo en tiu, aŭ alia lando, kiajn dancojn dancas la samaĝuloj en alia parto de la mondo, kiujn filmojn kun kiuj stelulinoj oni produktas kaj rigardas en iu malproksima lando, kian rezulton atingis certa sporta ĉampiono ktp. Se jam ekzistas la Internacia Lingvo kiel internacia ligilo, estus plej normale apliki ĝin por kontentigi tiajn interesojn, kiuj transsaltas la landlimojn. Neniu ĝis nun kuraĝis ekplugi tiun kampon.

La eldonado de tia gazeto, kian ni planas, postulos, kompreneble, koncentrigon kaj streĉon de fortoj. Ni devas ne timi ilin. Kun bona organizo de la laboro la problemo solviĝos. Memoru ni retojn de korespondantoj ĉe grandaj mondaj gazetoj kaj novaĝagentejoj. Sen altaj vojaĝelspezoj, sen apartaj salajroj ni povus organizi

La Nova Gazeto de Tejo

tian reton simile al la reto de la delegitoj de UEA. Nature, por komenco ni estos modestaj. Kion ni nun bezonas? Unue redaktan stabon. En la gazeto aperu rubrikoj: internacia junulara vivo, problemoj de la nuntempa socio, kulturaj okazaĵoj, filmo, amuzo, interesaĵoj, legaĵo, el Esperantujo. Pri ĉiu el ili zorgu unu persono — redaktoro, kiu laŭeble havu sperton pri koncerna fako. La laboron de ĉiuj redaktoroj direktu kaj koordinu ĉefredaktoro. Ili ĉirkaŭ si kolektu kunlaborantojn kiuj ne devas nepre esti gejunuloj. Ĉies aliĝon, ĉies kontribuojon ni tutkore bonvenigos. La gazeto estu redaktata en interesa maniero: kun raportaĵoj, intervjuoj, enketoj, sciigoj, amuzaĵoj, enigmoj, ilustraĵoj ktp. La eksteran aspekton oni plej ofte pridiskutis. Mi proponas ke la gazeto aperu unufoje monate, ĵurnalforme, en formato 40 × 28 cm kun ok paĝoj. Tiamaniere ĝi ne estos tro malofta, tamen ĝi lasos sufiĉan tempon por redaktado en komencaj malfacilaĵoj kaj per la formato ĝi ebligos variecon de la enhavo.

La plej tikla problemo, kiel ĉiam, estas la financa. Tie ni trovas la plej grandan skeptikecon. Oni demandas nin per kio ni komencos, kiu legos ankoraŭ unu apud tiomaj gazetoj. Sed konkurencon ni ne timas. Inter la esperantista gazetaro ne ekzistas eĉ unu kiu laŭ siaj koncepto kaj enhavo similus al la de ni planata. Problemo nur estas lanĉi ĝin. Por akiri tiun komencan monsumon ni malfermis ĉe UEA fondaĵon "Junulara gazeto". Oni riproĉas al ni: al vico da fondaĵoj, kiuj melkas poŝojn de esperantistoj, vi aldonis ankoraŭ unu. Estas vero. Sed ĉu tia entrepreno ne meritas etan obolon de ĉiu nia junulino aŭ junulo?

Tiel larĝe imagita gazeto, enhavriĉa kaj varia, kiu ne havas modelon inter la nuna gazetaro, devus altiri atenton ne nur de gejunuloj, sed ankaŭ de pliaĝuloj. Se ni sukcesos realigi nian ideon, se ni sukcesos doni unuavice al nia junularo en la Internacia Lingvo interesan gazeton, centojn da kiaj ni vidas en ĉiuj naciaj lingvoj — tio montros kiom fortaj kaj kapablaj ni estas, tio estos unu el la plej gravaj rezultoj de la Jaro de la Junularo.

En la Lernejo

En iu lernejo oni ekinstruis Esperanton. Tiam ni kutime ĝoje ekpensas: "Jen, baldaŭ dudek (aŭ kvardek, aŭ kvindek) novaj esperantistoj!" Malbone. Ni miskalkulis. En la nordokcidenta parto de Jugoslavio kiun mi konas, en Slovenio, lernis ekzemple en la lastaj kvin jaroj Esperanton iom pli ol 5.000 geknaboj. La membraro de esperantistaj organizaĵoj en la sama tempo kreskis per 500 personoj... do, nur 10 procentoj aliĝis al la Esperanto-Movado. Ĉu ne, ke la konstanta problemo de forfalado de kursanoj fariĝas jam tro ampleksa, ke ni povus rilati al ĝi same kiel oni faris en la tempo, kiam en unu urbo ne pli ol 50 personoj jare eklernis Esperanton, dek finis la kurson, kaj ĉio jam fariĝis natura leĝo por ni!


Mi mem lernis Esperanton hejme de la gepatroj. Ili zorgis, ke mi ne ĉesigis la lernadon, ĝin sukcese finis, kaj laŭ siaj eblecoj ili kontaktigis min kun eksterlandaj esperantistoj. Tiuj vizitis nian hejmon, mi trovis kelkajn korespondantojn kaj jam frue mi povis viziti internaciajn Esperanto-kongresojn. Estis por mi memkompreneble, ke en la ŝranko troviĝas esperantaj libroj kaj surtable diversaj gazetoj por legi. En tiaj kondiĉoj oni preskaŭ ne povas ne fariĝi esperantisto. Kaj kion ricevas lernanto de Esperanto en la lernejo? Ĉu la gepatroj, tio estu instruisto kaj esperantista junulara asocio, kapablas doni ĉion necesan, ĉu ili harmonie kunlaboras? Oni povus vicigi aron da demandoj, sed por ne tro kompliki ni vidu, kio estas jam nun farebla flanke de TEJO kunlabore kun la cetera Esperanto-Movado. Ĉiam ni konsideru jenajn ĉefajn laborkondiĉojn: rapide kreskanta nombro de gelernantoj, la Interŝtata Konvencio antaŭ la pordo, sed tamen en multaj landoj Esperanto ne ankoraŭ eniris lernejojn kaj tie la ĝisnunaj kondiĉoj restas neŝanĝitaj.

La Perspektiva Laborprogramo de TEJO parolas pri vastigo de koresponda servo, pri konstanta organizado de diversaj konkursoj, de internaciaj prelegvojaĝoj, ĉiujaraj landaj kunvenoj de esperantista junularo kun kultura programo kaj internaciaj kunvenoj kaj renkon-

tiĝoj. Tiuj kaj aliaj punktoj ne estis enmetitaj en la Programo speciale pro la lerneja instruado, tamen ilia plenumo signifus grandegan subtenon al tiu instruado.

Neniu el la supre menciitaj taskoj estas tro malfacila, sed estas necese konscii pri unu grava afero. Pri tio, ke firmigo de Esperanto-pozicioj en lernejoj inter gelernantoj, geinstruistoj kaj lernejoj instancoj dependas de la diligenta laboro de multaj unuopuloj unuflanke kaj de larĝe koordinitaj internaciaj aktivecoj aliflanke. Alian gravan principon mi ankoraŭ menciis: ĉiu esperanta kurso en la lernejo estu ankaŭ junulara grupo. Kial? Ĉar multnombraj spertoj pruvis, ke Esperanto restis kaj firmiĝis *nur* en tiuj lernejoj, kie paralele kun ĝia instruado aktivis ankaŭ lerneja esperanta grupo. En tiaj lernejoj preskaŭ aŭ tute malaperis kontraŭesperantaj voĉoj, la grupo fariĝis inter la plej aktivaj en la lernejo kaj esperantistoj respektataj inter neesperantista junularo. Kontraŭe en la lernejoj, kie oni nenion faris por ke la grupo vere vivu, tre fortiĝis kontraŭuloj de Esperanto, tiel ke kelkfoje plua instruado en tia lernejo estis malebligita. Mi eĉ kuraĝas supozi, ke la sukceso de Esperanto-instruado en lernejoj, ne tiu formala, kia ofte estas ĉe nun kutimaj fremdaj lingvoj, dependos de bona aŭ malbona enradikiĝo de lernejoj Esperanto-grupoj. Kaj de la laboro de tiuj samaj grupoj dependos, kiom da gelernantoj aliĝos post finita lernado al la Esperanto-Movado, ĉu tamen pli ol 10 procentoj!

**Svobodan
Zlatnar**



Svobodan Zlatnar estas sloveno, Estrarano de TEJO pri kulturaj kaj lernejoj aferoj.

Historia Perspektivo

Victor Sadler

"Zigzaga" — tiel karakterizas Tonkin en sia artikolo la progreson de la junulara movado. Se oni iom esploras la pasintajn ses jardekojn, oni devas konfesi la pravecon de tiu adjektivo: la nekontinuecon de tiu historio cetere substrekas la fakto, ke malofte oni trovas junan — aŭ eĉ pli aĝan Esperantiston, kiu ion scias pri tio, kio okazis antaŭ lia propra membriĝo.

Same kiel la revuo "Esperanto" fondiĝis jam antaŭ UEA, tiel ankaŭ la unua sukcesa junulara gazeto aperis en periodo, kiam ankoraŭ ne ekzistis organizita junulara movado. Temas pri "La Juna Esperantisto", komuna kreaĵo de Privat kaj Hodler, kiu naskiĝis kiel hektografaĵo en 1903, kaj daŭris en ĉiam pli bona formo ĝis la unua mondmilito. Dum sia pli matura periodo ĝi estis ilustrita kaj bone presita, kaj per enhavo grandaparte literatura, ĉe kiu ne mankis kontribuaĵoj el Afriko kaj Azio, ĝi prezentiĝis kiel vere bonnivela. Inter la kontribuintoj elstaras la nomoj de Kabe kaj Grabowski. Dum tiu sama periodo okazis pluraj provoj por fondi ian junularan organizaĵon, sed el ĉiuj nur la studenta — Internacia Studenta Ligo, fondita en Praha en 1909 — iom longe vivis.

Ankaŭ ĝi tamen balanciĝis, kaj en la jaro 1913 fondiĝis "Universala Studenta Asocio", kiel studenta fako de UEA. En la "Studenta Bulteno", kiu aperadis kiel suplemento de la revuo "Esperanto", oni povis skribi, ke la tri aliaj studentaj organizaĵoj de tiu tempo ekzistas "nur sur papero". Malgraŭ sia "papera" ekzisto, la "Internacia Studenta Ligo" postvivis la studentan fakon de UEA, kaj en la jaro 1926 havis 16 klubojn- membrojn, kvankam ilia kunlaboro ne estis kontentiga.

Preskaŭ tuj post la unua mondmilito, nome en 1920, fondiĝis TEJA: Tutmonda Esperantista Junulara Asocio, kiu eldonis ĝis 1928 la organon "Esperantista Junularo". En 1929 la ĝenerala junulara movado ŝajne dormis, sed tiu jaro produktis tute novan studentan organizaĵon ĉe la Universala Kongreso en Budapeŝto. La mortintan I.S.L. anstataŭis STELO: Studenta Tutmonda Esperantista Ligo, kun originala organiza formo. Ekde 1931 la organizado prizorgis unu sola studenta klubo, nome tiu de Zagreb. Tia-

maniere solviĝis iagrade la problemoj de la kontinueco kaj de la kontakto inter la funkciuloj. Tiel daŭris ankoraŭ ĝis la dua mondmilito. Intertempe, en 1934 ekaperis belaspekta junulara gazeto, "La Juna Vivo". Ĝia enhavo estis parte instrua, parte distra, kaj direktiĝis pli ĝuste al infanoj, ol al tiuj pli maturaj junuloj, kiuj hodiaŭ formas la bazon de la junulara movado. Ĝi servis kiel tre kontentiga ligilo, kaj en 1938, kiam okazis la unua Internacia Junulara Kunveno en Groet (Nederlando), ĝi fariĝis la oficiala organo de la nova TJO (Tutmonda Junulara Organizaĵo). Tiun unuan kuvenon ĉeestis pli ol 200 gejunuloj el 9 landoj, kune kun siaj geinstruistoj. La duono estis el Anglujo, kaj iliaj aĝoj estis inter 12 kaj 18 jaroj (kontraste, 80% el la anoj de la 17-a IJK en Wokingham, 1961, estis pli ol 18-jaraj).

Post la milito la studenta movado estis aparte nestabila, malgraŭ pluraj provoj eĉ ambiciaj. Menciinda inter ili estas IFESA (Int. Fed. de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejoj), kiu dum pluraj jaroj aperigis presitan kaj ilustritan organon. Nur ekde 1958 ekzistas iom pli konstanta organizaĵo, kiu alprenis la tradician nomon de STELO, sed preferis la pli kutiman sistemon de internacia estraro. Hodiaŭ ĝi estas kunlaboranta faka asocio de UEA. TEJO, aliflanke, jam en 1947 reprenis la kutimon, okazigi ĉiujare internacian renkontiĝon, kaj la ĉijara en Vraca estos la 19-a en la serio. La ĝisnunaj Junularaj Kongresoj okazis en 11 landoj de Eŭropo. En 1956 TJO, nun nomita TEJO, forlasis sian sendependan staton kaj fariĝis junulara sekcio de UEA. En la sama jaro la organo "La Juna Vivo" fariĝis rubriko de "Esperanto". Sendepende aperadas tamen almenaŭ 11 junularaj gazetoj en Esperanto en deko da landoj, kaj landaj sekcioj de TEJO ekzistas en 15 landoj.

Tiu ĉi konciza resumo eble sufiĉas por montri la esencajn karakterizojn de la junulara kaj studenta movado. Kvankam ankoraŭ la situacio neniel estas kontentiga, oni povas rimarki almenaŭ ian plisolidiĝon de la organizaĵoj kaj plivastiĝon de la aktivaĵoj. Ni certigu, ke la Jaro de la Junularo aperu en eventualaj postaj historiaj studoj kiel decida jaro en la evoluo.

La fenomeno de la Bulgara Esperanto-Junularo

Simeon
Simeonov



Simeon Simeonov estas bulgaro, vicprezidanto (kun Carlo Minnaja) de TEJO, estrarano de TEJO pri informado, kaj LKK-ano de la 48-a Universala Kongreso.

Supozeble pluraj personoj, leginte la informojn pri la lastjara tutlanda balo-renkontiĝo de la bulgara Esperanto-junularo en Ruse, akceptis la sciigon pri la partopreno de pli ol 1500 gejunuloj kun miksitaj sentoj: unuflanke kun miro kaj ĝojo, aliflanke kun certaj rezervoj. Aperas la natura demando: ĉu oni povas kalkuli je 1500 centprocente perfektaj esperantistoj? Ni tuj diru, ke la pozitiva respondo estas senutila memiluziĝo. Sed restas la nekontestebla amaseco dank'al vasta interesiĝo al la Internacia Lingvo en junularaj medioj, interesiĝo, kian mi persone observis en preskaŭ neniuj aliaj landoj (eble kun la escepto de Jugoslavio kaj Pollando).

Mi provu analizi la menciitajn fenomenojn.

La bulgara popolo estas sciema. Ĝi scivole observadas kaj senhezite aprezas la kulturajn valorojn kreitajn de aliaj popoloj. Ĉu mi aparte substreku, ke sendube tio ĉi tute speciale rilatis la junularon. Do, la interesiĝo al Esperanto, kiel efika ilo por senperaj kontaktoj kun aliaj popoloj, certgrade ŝuldiĝas al faktoroj ekster la movado kaj ne ekskluzive al la Esperanto-informado.

Krome la movado en nia lando havas bonan socian aŭtoritaton, dank'al siaj historiaj ligoj kun la plej klarvidaj fortoj de la popolo kaj dank'al siaj noblaj klopodoj, eĉ en periodoj politike plej mallumaj.

Nur mallonga superrigardo de la Esperanto-instruado al junuloj malkovras al ni vere ĝojgajn faktojn. En Ruse ĉiujare funkcias kelkaj kursoj en la lernejoj; en Miĥajlovgrad oni instruas la lingvon al pli ol 200 gelernantoj kaj

inter ili estas ĉ. 70 abonantoj de la asocia organo (ni ne parolu pri aliaj gazetoj abonitaj); en Pazarĝik kaj Vraca dum pluraj jaroj oni instruas Esperanton en la gimnazioj; en Plovdiv kaj Sofio ekzistas viglaj studentaj societoj kaj oni instruas al lernantoj; en Varna ankaŭ viglas studentaro, kiu patronas junpionirojn; en Karlovo junularaj grupoj konkuras; en kelkaj vilaĝoj junaj kamparaj laboristoj praktikas la lingvon; en Polski Trambes dum jaroj funkcias unu el la plej aktivaj rondoj de "Grajnoj en Vento" kaj Esperanto jam enradikiĝis en la ĉiutaga vivo de la gimnazio.

Kapablaj instruistoj laboras en ĉiu el la menciitaj lokoj kaj ili atingis tiujn rezultojn per persista instrua laboro kaj eble ne per ia eksterordinare intensa varbado. Se tiuj rezultatoj estis atingeblaj en pluraj lernejoj, kial ilin oni ne atingu ankaŭ en aliaj? La logika konkludo estas, ke tiu vere kontentiga stato, tamen ne plene ankoraŭ respondas al la potencialaj eblecoj. La ŝlosilo kuŝas en la manoj de la instruistoj; dume la grundo favora estas pli malpli preta.

ĉe TEJO-Kongreso



Esperanto en Radio Zagreb dekjara



Persisto estas la kronmono de la sukceso. Esperantlingvaj radio-elsendoj estas nepra sukceso, eĉ se ili ekzistas sporade kaj malofte aŭ en nefiksitaj cikloj. Se oni komparas la grandegan nombron de radio-stacioj en la mondo kaj la malgrandan nombron de tiuj elsendantaj esperantlingvan programon, altrudiĝas la konstato ke tiukampe la movado nesufiĉe faris kaj devus tre streĉi siajn atenton kaj forton por atingi pli. Ĉar se ekzistas agadkampo kie la Internacia Lingvo estas pli ol bezonata, tiu estas la radiofonio kiu per pli vastskala apliko de la Internacia Lingvo malfermus grandegajn eblecojn por la internacia kontakto kultura kaj ĉiuspeca.

El tiu vidpunkto la 10-jara konstanta laboro en Esperanto-fako de unu Radio-stacio prezentigas kiel valora, pozitiva kaj sukcesa agado, sen helpo de troigoj kaj plibeligoj.

La Esperantlingvaj elsendoj de Radio Zagreb estis fonditaj honore al la 38-a Universala Kongreso okazinta en Zagreb en la jaro 1953. Ek de aprilo de tiu sama jaro ĝis hodiaŭ, seninterrompe ili daŭras kaj elsendas unufoje semajne esperantlingvan programon.

Multaj okazaĵoj kaj helpis kaj obstaklis la elsendojn dum tiuj 10 forflugintaj jaroj. Certe la unua kaj la plej granda helpo estas la aŭskultantoj kaj korespondantoj, kiuj per siaj leteroj, aŭ nuraj salutkartoj, kuraĝigas la laboron de la redakcio kaj klare montras al la direkto de radio-stacio ke esperantlingvaj elsendoj havas internacian aŭskultantaron. Kompreneble, sen konsento kaj favoro de la direkto de radio-stacio, la esperantlingvaj elsendoj entute ne povus ekzisti, ĉar la direkto disponigante la teknikan servon kaj honorariante la program-kreantojn, ebligas la elsendojn. Eĉ ne unu esperantista asocio aŭ societo en la mondo estus sufiĉe riĉa por kontraŭ pago mendi esperantlingvajn elsendojn. Tiuj kostoj estus treege altaj. Pro tio oni ja devas kompreni ke radio-stacio ebligante la elsendojn postulas respekton de siaj deziroj en kunmetado de la programoj. La preparantoj de la esperantlingvaj radio-programoj ne povas atenti nur la esperantajn

temojn (recenzojn, novaĵojn el la movado, gravajn movadajn datrevenojn), sed ili devas per la Internacia Lingvo informi la internacian publikon pri la koncerna lando, ĝia socia kaj ekonomia strukturoj, ĝiaj naturbelaĵoj. Tiajn programerojn kelkaj aŭskultantoj opinias "politiko". Kie la "politiko" komenciĝas kaj kie ĝi finiĝas? Prezenti naturbelaĵojn de siaj montoj kaj lagoj malmultaj komprenos "politiko", kvankam la intereso de ĉiu ŝtato estas progresigi turismon, same kiel konigi sian politikan-socian sistemon, kiun temon multaj opinios "politiko". Tamen la grandega plimulto de aŭskultantoj komprenas la delikatan situacion de la redakta komitato preparanta la esperantlingvajn elsendojn kaj vere sincere, amike kaj senfine afable helpas tiun laboron.

La redakta komitato siaflanke devas zorgi pri varieco de la programoj, ĉar estu ili "politikaj" aŭ ne, ekzistas eĉ ne unu temo kapabla kateni intereson de ĉiu.

Varieco de la temoj, inter kiuj ne mankis distraĵoj kaj humuraj, internaciismo kaj informado pri diverskampaj atingiĝoj de la propra lando, estis la program-principoj en Esperanto-fako de Radio Zagreb dek jarojn sensange. Dum tiu tempo trifoje ŝanĝiĝis la redakta komitato, sed la gvidprincipoj en la redaktado ne.

Ankaŭ Radio Zagreb ricevas multajn leterojn, al kiuj ĝi ĉiam respondas, kelkfoje nur per du tri vortoj en la lasta elsendo de ĉiu monato. Sed Radio Zagreb bone scias, ke multaj konstante aŭskultas kaj neniam skribas, ĉar ili aŭ ne havas tempon aŭ estas nekorespondemaj. Oni ja devas ilin kompreni. La nacilingvaj elsendoj havas milionojn da aŭskultantoj kaj radio-stacioj ricevas kelkcenton, aŭ la plej fortaj, kelkmilon da leteroj. Gravas ke aŭskultado de esperantlingvaj elsendoj fariĝu kutimo kaj bezono de ĉiu esperantisto, kio nun ne estas. Ekzistas multaj funkciuloj kaj aktivistoj de la movado, kiuj neniam aŭskultas esperantlingvajn elsendojn, ĉar ili "ne havas tempon" por tio, kvankam, ekzemple en Eŭropo, ne ekzistas lando el kiu estus maleble kapti almenaŭ unu radio-stacion, elsendantan esperantlingvan programon.

Ĉar kelkloke, certe, necesus nur forte kaj ĝustamaniere frapi sur la pordon de la radio-stacio, ĝi malfermiĝus kaj enlasus Esperanton. Sed ekzistas neniu, kiu scius kaj volus frapi.

Provu vi! Eble vi ne sukcesos tuj. Provu denove, ĉar sciu: persisto estas la alia nomo de la sukceso.

Emilija Lapenna,
Esperanto-fako de Radio Zagreb
Ondolongo 264,7 m. Elsendas ĉiujfaŭde
je la 23,03 laŭ MET, aŭ 22,03 laŭ
Greniĉo.

„Teknika Progreso”

En unu grava ĵurnalo oni antaŭnelonge skribis, ke "la teknika progreso fariĝis sukcesplena konkuranto de Esperanto". Se iu neniam havis okazon por mem kontroli, ĝuste kia estas tiu "progreso", tiu facile povas kredeti, ke efektive la nuntempaj internaciaj kongresoj, kun siaj luksaj ejoj, elektrona aparataro kaj multekostaj servoj de tradukado kaj interpretado, pli malpli venkis almenaŭ sian propran lingvan problemon. Tiujn personojn povas interesi la jenaj notoj, faritaj dum unu internacia konferenco — sen Esperanto.



Enmuritaj en siaj lingvoj — internacia registara konferenco

Kvankam en la konferenco estis ankaŭ aliaj nacioj, tamen la laborlingvoj estis la franca kaj la angla. La prezidanto de la konferenco aparte petis, ke neniu parolu en alia lingvo — "ĉar mankas la rimedoj". Nome, ĉeestis interpretistinoj por la angla kaj franca, sed ne por aliaj lingvoj. La interpretistinoj laboris dum la tuta konferenco alterne, ĉiu dum 30-minuta periodo. Inter siaj deĵoroj ili legis detektivromanojn — "por resti mense sanaj", ili klarigis al mi.

Tiel la 55 delegitoj estis elektitaj de siaj sendintoj, ke el ĉiuj nur unu (usonano) ne komprenis la francan. Plie, preskaŭ la tuta diskutado okazis en tiu lingvo. Sekve, du alte salajrataj interpretistinoj laboris preskaŭ ekskluzive pro unu persono el 55. Tio en si mem povas ŝajni iom groteska, sed bedaŭrinde la groteskaĵoj ne finiĝis per tio. En tiu lukse ekipita salono de unu el la plej modernaj kongresejoj de la tuta Eŭropo, tiel bone manifestiĝis la teknika pro-

greso, ke la voĉoj de la interpretistinoj estis aŭdeblaj tra la tuta salono, malgraŭ iliaj propraj klopodoj por paroli kiel eble plej mallaŭte, kaj malgraŭ la sonizolaj muroj, kiuj ĉirkaŭis ilin. Sekve, multaj personoj, inkluzive francalingvanojn, kiuj malgraŭ la apartaj prononcm manieroj de ekzemple italoj verŝajne komprenus la francalingvajn paroladojn, devis alpreni siajn aŭskultilojn por aŭdi — ne la tradukon — sed la originalon, kaj por elfermi iomete la aliajn bruojn. Do sume, ĉar unu pesono ne komprenis la francan, tuta aro da delegitoj devis uzi la aŭskultilojn.

La kaŭzo, kial fona murmurado estas tiel ĝena, estas tio, ke oni ja ne povas samtempe aŭskulti du malsamajn voĉojn. Ĝuste tial do, la prezidanto de la konferenco kompreneble ne povis samtempe aŭskulti sian propran voĉon kaj la voĉon de la interpretistino. Li tial sendube ne rimarkis, ke li starigis proponon, invitis voĉdonon, kaj anoncis la rezulton de la voĉdono antaŭ ol la interpretistino povis fintraduki la proponon mem!

La konferenco aŭdis interalie raporton de administra komisiono. Ĉu necesas mencii, ke la administra komisiono okupiĝas ĉefe pri la problemoj de la traduko de dokumentoj de la komisionoj (inkluzive tiujn de la administra komisiono)?

Kaj ĉu la tradukado kaj interpretado estas almenaŭ sur alta nivelo? Tion, bedaŭrinde, mi ne povas raporti — ĉar miaj aŭskultiloj ne funkciis.

V. Sadler

☆

Postskribo

La ĵus aperinta raporto de la Ĝenerala Direktoro de UNESKO por 1962 montras, ke ĝia lingva fako tradukis dum tiu jaro 57.719 paĝojn (kio signifas pli ol 18 milionojn da vortoj), kompare kun 49.127 paĝoj en la antaŭa jaro. En la sama jaro, interpretistoj laboris 5.809 interpretistotagojn ĉe UNESKO-kunvenoj, je kosto de 189.125 usonaj dolaroj. La kvanto de interpretado kreskis per 85% kompare kun 1961.

DENSECO DE LA UEA-MEMBRARO EN DIVERSAJ LANDOJ

El la kutima statistiko pri la membraro de UEA (vidu ekzemple p. 57, marta eldono) oni facile vidas, en kiuj landoj la membroj de UEA estas plej multaj. Sed oni ne forgesu, ke la landoj neniel estas egalaj laŭ grandeco kaj loĝantaro, tiel ke malgranda nombro en unu lando povas esti pli signifa, ol la sama nombro en alia lando. Por doni pli ĝustan superrigardon pri la forteco de nia movado en la diversaj landoj, en kiu UEA havas konsiderindan nombron da membroj, CED preparis la jenan tabelon, kiu montras post ĉiu lando la efektivan nombron de la membroj en 1962, poste la loĝantaron de la lando laŭ plej lastaj statistikoj, kaj fine la densecon de la membraro en tiu lando, t.e. la respondon al la demando, en ĉiu miliono da loĝantoj, kiom estas membroj de UEA?

Lando	Membroj	Loĝantoj (milionoj)	Denseco
1. Bulgarujo	4248	7,9	537
2. Svedujo	1786	7,5	238
3. Danlando	1037	4,6	225
4. Jugoslavio	3695	19,0	194
5. Norvegujo	636	3,6	176
6. Nov-Zelando	405	2,4	168
7. Hungarujo	1537	10,0	153
8. Pollando	3359	30,0	112
9. Nederlando	1145	12,0	95
10. Aŭstralio	262	3,0	87
11. Aŭstrujo	519	7,1	73
12. Svislando	391	5,4	72
13. Finnlando	295	4,5	65
14. Francujo	2282	46,0	49
15. Belgujo	419	9,2	45
16. Germanujo	2441	71,0	34
17. Italujo	1421	51,0	27
18. Britujo	1397	53,0	26
19. Argentino	516	21,0	24
20. Hispanujo	670	30,0	22
21. Brazilo	1068	70,0	15
22. Japanujo	1409	94,0	15
23. Kanado	154	18,0	8
24. Ĉeĥoslovakio	101	14,0	7
25. Usono	695	190,0	3

En la tabelo ne estas montritaj tiuj landoj, kie ekzistas malpli ol 100 membroj de UEA. Jenaj konkludoj ŝajnas pravigeblaj:

1. Notinde altajn poziciojn okupas kelkaj orient-eŭropaj kaj skandinaviaj landoj.

2. La rilato inter loĝantaro kaj denseco de la membraro estas tuj evidenta: ju pli granda la loĝantaro de la lando, des malpli densa nia membraro.
3. Tio povus esti ligita kun la "forteco" de la koncernaj naciaj lingvoj — sed tiurilate tre okulfrapaj esceptoj estas Aŭstralio kaj Nov-Zelando.

UEA ĈE KUNVENO DE NRO

La 22-an kaj 23-an de aprilo okazis en Bruselo la 3-a Kunveno de la Komitato de Ne-Registaraj Organizaĵoj (NRO) en konsultaj rilatoj A kaj B kun UNESKO, elektita de la 8-a Konferenco de NRO. La Ĝenerala Sekretario de UEA, ŝargita pri la eksteraj rilatoj, ne povante mem ĉeesti komisiis al D-ro Sadler reprezenti la Asocion. La kunveno pritraktis i.a. la eldonon de broŝuro pri NRO en diversaj lingvoj, kaj la demandon de transpago de kotizoj al internaciaj organizaĵoj el landoj kun valutaj malfacilaĵoj.

Grava riĉigo de la Biblioteko de UEA.

La alvoko "Savu niajn librojn", publikigita en la oktobra eldono de "Esperanto", 1962, jam redonis plurajn eĥojn. Sen ia diskuto la ĝis nun plej grava kaj valora estis tiu de la familio Staritsky — nomo delonge konata en la Esperanto-movado. S-ro D. Staritsky mortis en Haarlem, la 25-an de oktobro 1962. Kiam aperis la oktobra eldono de nia organo, li estis jam tre malsana, kaj ne plu kapablis paroli. Malgraŭ tio, li evidente sentis fortan deziron, konservigi por la Esperantistoj la multajn librojn kaj manuskriptojn, kiujn li kolektis, kaj li sukcesis komuniki tiun deziron al siaj familianoj. La decido, heredigi la grandan plimulton de la kolekto al UEA, estis inter la lastaj decidoj de lia vivo.

S-ro Staritsky estis laŭnaske ruso. Edziĝinte tamen kun nederlandanino: S-ino Nelly Staritsky, kies patro, J. W. Sevenhuijsen (1858-1923) estis nederlanda pioniro de Esperanto, li dum multaj jaroj loĝadis en Nederlando kaj sentis sin parte ankaŭ ano de tiu lando. Kvankam li turnis siajn literaturajn talentojn al kelkaj nederlandaj aŭtoroj, la granda rusa literaturo ĉiam katenis lian atenton. Inter la materialoj transdonitaj al UEA troviĝas kompletaj prespretaj manuskriptoj, kies nura titolaro estas kvazaŭ bibliografio de la rusa literaturo. Sufiĉas listigi la nomojn de Mereĵkovskij, Turgenev, Dostoevsky, Serafimoviĉ, Lermontov, Kuprin, M. Gorkij, Gogol, Ehrenburg, Osorgin, Ĉeĥov, Korolenko, Vitalij Bianki kaj A. Tolstoj, por komprenigi, ke lia traduka laboro estis vere monumenta, kaj konsistigas gravan potencialan riĉigon de la tradukita literaturo de Esperanto.

Ĝis sia morto, S-ro Staritsky sukcesis eldoni nur unu el siaj tradukoj: "Kiso de la reĝino" de Naĵivin, kiu aperis ĉe Esperanto Publishing Company en 1950. Kune kun multaj libroj, kiuj portas lian nomon, la neeldonitaj manuskriptoj restos zorge konservataj en la domo de UEA; ni esperu, ke jam baldaŭ troviĝos la rimedoj por kompleta publikigo de tiu kolosa vivlaboro.

Novaj Libroj

Cion ricevitan ni mencias. Verkojn por recenzo ni elektas inter la duope ricevitaĵoj. Neneŭtralajn eldonaĵojn ni senpartie resumas. *) ricevebla ĉe U.E.A.

NOVA VERKO DE ZAMENHOF

Fabeloj, de H. C. ANDERSEN, kvara volumo, trad L. L. ZAMENHOF. Eld. Heroldo, Bruselo, 1963. 242 p. 20,5 × 15 cm. Ilustraĵoj de Antoni UNIECHOWSKI. Prezo: 11,50 gld. (46 st).*

Jen, malfrue je kvardek jaroj, nova verko de Zamenhof. Ni trovas nin unu momenton transportitaj en la epokon antaŭ 1914; ni povas demandi unu al la alia, Ĉu vi legis la plej novan verkon de Zamenhof?

La verkon de geniulo, tradukitan (eĉ nerekte, tra la germana) de alia geniulo, oni ne pritaksas, ĉu ĝi estas bona aŭ ne: la du nomoj de Andersen kaj Zamenhof garantias la plej altan kvaliton.

Pri la korekteco de la traduko mi ne povas paroli, nesciante la danan lingvon kaj ne posedante la germanan tradukon, kiun Zamenhof uzis. Cetere, D-ro Neergaard, en sia majstra recenzo aperinta en *Heroldo* de 1 Majo, faris pri tio la definitivan analizon, laŭ kiu ĉiuj eraroj ŝuldiĝas al la germana peranto. Tiuj eraroj ne estas percepteblaj al la leganto; kaj nur Danoj rimarkos, kie vorto saturita de asociacioj ne povis revivi en Esperanto. Per sia mirinde simpla kaj pura stilo Zamenhof sukcesis kapti ion esencan en la Andersena rakontmaniero: la subtilan interplektiĝon de humuro kaj melankolio, la kunfandiĝon de la fabela mondo kun la kruda realaĵo, la ĉie sentatan ĉeeston de la morto, la konsolan lecionon, ke la Bono tamen validas kaj valoras. En la plej longa fabelo, "Historio de la dunoj", ni havas la senton, kvazaŭ ni trafis en iun specifan kvaliton de la dana animo; neeviteble revenas al la memoro la libroj de Blicher, "Taglibro de Vilaĝ-pedelo" kaj "La Pastro en Vejlbaye" (kaj la fama dana filmo, "Dies irae"). Jen eble la malfronto de la medaliono prezentita de *Pluk* kaj *Gruk*.

Ne pro la fabeloj mem, tamen, sopiris multaj Esperantistoj la

aperon de ĉi tiu libro. Ili volis legi ion el la plumo de Zamenhof, kaj eĉ tion ne tiom pro la beleco de lia stilo, kiom por vidi, per kiuj lingvaj ideoj li pliriĉigis la lingvon. Do sen skrupulo, kaj eĉ renkontante la riproĉon, ke mi mezepokece diskutas pri "la sekso de la anĝeloj", mi pasos al la lingvistika analizado.

1) Aldoniĝu al PV: 3 neologismoj — *atamano* (ĉefo) 105, *krinolino* 216, *ŝlifi* (poluri; germ. schleifen) 165. Aliaj formoj: *Leviatano*, *toasto*. Aliaj signifoj: *paradaĵo* (vestaĵoj) 28, *budo* (hunda dometo) 110, *krozi* (venki kontraŭan venton, t.e. taki, de Marista Terminaro) 130, *drinkado* (pri ĉevaloj) 220, *fasono* (formo, de beko) 50. Teknikaj vortoj: *numenio* (jam en ĉiuj anglaj vortaroj por *curlew*) 53. *bastonulo* (akvoplanto) 67, *lemno* (jam en la angla Millidge por *duckweed*) 68. Aliaj vortoj: *nikso* (jam en Wüster, ZR), *komisario* (en Wüster, Encikl. Vort.), *primadono* (en Millidge), *sterkskarabo*, *pupludisto*, kaj (por Armea Terminaro) *Marŝ'! Halt'! Front'!* 210.

2) Aldonu Z al la vortoj en PV: *garolo* (Wüster ZR), *gnomo*, *marabuo*, *pigmeo*, *sempervivo*, *somnambulo*.

3) Propraj Nomoj (a) Personoj: Neeble trovi sistemon. Asimilitaj estas *David*, *Filemono*, *Napoleono*, *Pigmaliono*, *Venero*, sed ne *Adam*, *Hamlet*, *Solon*, kaj nur duone, *Luter*. Inaj nomoj plejparte en -o: *Ido*, *Anno*, *Margareto*, *Sofio*, *Klaro*, *Baŭcido*, *Galateo*, *Mario* (sed unu paĝon antaŭe, 185, *Maria*!); sed *Eva*, *Helga*. Danaj nomoj estas plejparte neasimilitaj, sed *Valdemaro* 75. (b) Landoj kaj urboj: *Egiptujo*, *Bavarujo*, *Neapolo*, *Vezuvio*, *Pompejo*, *Herkulano*, *Stuttgart*; sed neasimilita kaj kun z: *Jeruzalem*. Notindaj: *Romaj dioj* 202, *la Galla bordo* 27.

4) sintakso (a) *kvazaŭ*: teorio aperonta en proksima *Esperantologio* estas konfirmita. (b) -us anst. *estus* -inta: regule, ekz. 38/19, 80/3, 162/7

(kp. 164/-2), 198/13. Simile povus 39/15; sed devis 36/19 por estus devinta (v. *Esperanto* 1958, p. 11). (c) adjektivo kiel substantivo la plej grava nun estis aŭskulti 31/-11; tio estas la plej grava 62/2; la plej malbona estis tio, ke 124/2; ŝtelis de li la solan, kio estis kara 175/-7. (d) absoluta participo: parolante inter ni 53/5, esceptinte 197/-8. Stranga la uzo de la pasiva en -ite: li tenis ŝin ĉirkaŭprenite 51/-8; kp. 111/11; teni la okulojn malfermite 163/10; prezentos teatraĵojn mallongigite 202/-9; ni agas ĉiam pripensite 233/-13; mi kaŝite deziras 233/-9. (e) "multe" kiel substantivo: estis multe per kio 197/-14; kp. la multe da anĝeloj (lupoj) 168/3 kaj 169/-13. Stranga: kiom multe povas esti atribuate. (f) varia: al tio en la senco de aldone al (krom) tio 173/-3, mi kun li estas gefianĉoj 175/-15; pli ol unu da fiŝuloj 216/-5; ni ĉi estas kaj li plu ĉi ne estis 10/-7, 202/7; netrans. manipuli (kun la leĝo); kaj la stranga des pli anst. des malpli 23/15 kaj ĉiam escepte 32/7.

5) Sufiksoj: *sufiĉege* (abunde), *pluaĵo* (kolektive, anst. *kreit(aĵ)aro*), *devenantaro*, *societemeĉo*, *neuzeblaĵo*, *hufumo*, *interkrutejo*, *tabulbarilo*, *kurantaŭiĝi*, *triferdekulo* 79/11 (kp. trimastulo 163 kaj Marista Terminaro, kaj tankulo en Okcidentgerm. Revuo 1962/2), *ne peninde* (anst. *ne penvaloras*) 86/-5, 103/-6.

6) Prepoziciaj Prefiksoj: *trasuferi*, *traelparti*, *traspicita*; *kunkunblovitaj*, *kunkuntenas*. Aparte transitive: *tradormi tempon* 64/6, *primajstri la fortojn* 82/6, *piradii min* 236/19, *forrevi sian vivon* 157/-8, *superbrui ilin* 76/-8, *superoni la mian* 156/7, *elsonori tion* 70/1, *elpalpebrumi akvon* 222/4. Ankaŭ pri laŭ PV Ite, 2: *primordeti*, *pripinĉado per la beko* 30/5, *pirigardi*, kaj eĉ *primortigi* 178/-4.

7) Kunmetaĵoj: *falsvojigi* 65/2, *far-pova* 143/2, *volvekreskaĵoj* 29/-6, *vestmaskita* 200/8, *artplena* 6/13, *aerdifekti* 161, 153, *foskavo* 168/-9, *astrofloro* 127/14.

8) Frazoj: *ludi sinkaptadon*, *fari akvotretadon*, *toasti vivuon*, *ekpuŝe malfermi*, *mejle grandaj*.

9) Arkaismoj: *povoscii*, *alaspekta*, -i, *speso* (-deko, -milo), *paciĝi kun tio* (rezignacii pri), *rilate* (relative) 185/-9, *plenforme* (formale), *tio estas riĉaj homoj* 76/-17 kaj ofte, *unu kiel nedifina artikolo* 133/1, 230/-3, *fianĉigi fraŭlinon* 224/12, -ad- ĉe ripetata ago 5/-6, 6/-11, 185/1, *tion sciigi* 22/1.

10) Neperfektiva -ata: estas interrompataj 161/9 k.c. Perfektiva -ita:

estis amita (eĉ ĉe verbo de daŭro !) 111/-1 k.c.

Sed sufiĉu! Esperanto ne estis kreita por esperantologoj, sed kontraŭe; kaj kvankam li sciis, ke ĉiu lia vorto havas — eĉ kontraŭ lia volo — leĝdonan forton por la plimulto el la Esperantistoj, Zamenhof certe neniam verkis beletrajn kun la celo samtempe instrui grammatikon. Estas evidenta tio, kio lin altiris al la verko de H. C. Andersen: eĉ pli ol la nedifinebla ĉarmo de la rakontoj kaj la spir-raba riĉeco de la fantazio, devis frapi lin la profunda vivsaĝeco, la optimismo malgraŭ ĉio, la manifestaj signoj de animo parenca al lia propra, — animo de "vera tutmondano, al kiu ŝovinismo estis abomena", (kiel skribis biografo). Instrui sen ŝajno instrui, jen la magio de Andersen. "Mi kaptas ideon por la plenaĝulo kaj tiam rakontas por la malgranduloj, memorante, ke la patro kaj la patrino ofte aŭskultas, kaj al ili oni devas doni ion por la penso", li skribis en letero de 1843 "Ion por la penso" — tio povus esti la devizo de ĉio, kion skribis Zamenhof.

Sen Esperanto ni eble neniam estus legintaj en plenkreskuleco la Fabelojn de Andersen, kaj ni estus anime tiom pli malriĉaj pro tio. Al *Heroldo*, kiu prezentas al ni ĉi tiujn 240 belajn paĝojn da zamenhofa Esperanto (inter ili 69 versojn da tradukita poezio) en vesto tute inda je ambaŭ homoj, kaj al ĉiuj okupiĝintaj pri la eldono (inter ili S-ro A. Uniechowski, kies desegnaĵoj kontribuas multegon al la ĝuo de la leganto), ni esprimas sinceran dankon.

D. B. Gregor (Northampton)

Sipestro rakontas, de F. T. LUNDQUIST, eld. Eldona Societo Esperanto, Malmö 1962. 72 p. 19 × 12 cm. Prezo bind. 6,00 gld. (24 st.), broŝ. 3,75 gld. (15 st.).*

Jen verko el speco, kiu certe ne estas tre reprezentata en la Esperanta literaturo. La 70-paĝa malgrandformata libreto rakontas travivaĵojn reale spertitajn de persono, kiu preskaŭ sian tutan ekziston pasigis sur la oceanoj. La leganto sentas sin kvazaŭ infano, kiu dum malvarma vespero sidas apud la kameno kaj atente aŭskultas al sia 80-jara avo, kiu fabellas, sen iu ajn beletra pretendo, pri longaj vojaĝoj kaj foraj insuloj. Kaj fakte la kvar rakontoj estas streĉaj, kaj la aventuroj ĉiam emociaj. Tralegante ilin oni havas ankaŭ historie interesan super-rigardon al la ĝenerala vivo de la velŝipaj maristoj, kaj oni povas rimarki, kiel senrajtaj kaj senprotektaj estis iliaj vivkondiĉoj ĉe la komenco de la nuna jarcento: kruela ŝipestro povis laŭplaĉe tur-

menti siajn subulojn, kaj aro da senskrupulaj personoj riĉigadis funkciante kiel perantoj inter kapitano serĉanta ŝipanojn kaj maristoj sopirantaj dungigon. Oftaj komparoj kun la nuna situacio de la "marfratoj" sur la vaporŝipoj estas ankaŭ interesaj.

La lingvo, kontrolita de C.D.A. Capp, estas senriproĉa, kaj instruas multajn ne ofte renkontatajn maristajn terminojn; de kelkaj estas donita ankaŭ la ekvivalento en angla ĵargono, kaj multaj estas enlistigitaj en fina tre utila kolekto de difinoj. Ekstera aspekto plaĉa, kiel kutime en la svedaj eldonaĵoj.

Carlo Minnaja (Romo)

Logiko de MARTINUS, eldanigis Ib SCHLEICHER, eld. Martinus-Instituto, Kopenhago, 1962. 200 p. 25 × 18 cm., bindita. Kelkaj ilustraĵoj. Prezo 11,50 gld. (46 st.).*

La grandaj filozofoj plej spiritparencaj al Martinus estas Bergson kaj Teilhard de Chardin, pro lia koncepto de ĉio kiel viva kaj konscia kaj pro lia granda emfazo je la kosma evoluado.

Lia ĉefintenco, harmoniigi religion kaj sciencon per scienca pruvo de la veroj religiaj, ne estas nova. Lia pruvo de la ekzisto de Dio, per la intelekto, reguleco kaj laŭceleco de la naturo, en la historio de la filozofio estas konata kiel la *fizikoteologia*.

Malgraŭ liaj abundaj biblicitaĵoj lia mondokoncepto estas esence pli simila al la hinduismo, ankaŭ al teozofio kaj al antropozofio, ol al la ortodoksa kristanismo. Dion li vidas kiel animantan la mondon de interne, ne kiel regantan la mondon de ekstere, kiel la ortodoksaj judismo kaj kristanismo. Ĉar ankaŭ la inteligente konstruita homa korpo devas esti la produkto de intelekto, li kredas la *reenkarnigon*. La peko laŭ li, ne kiel laŭ la ortodoksa kristanismo, kaŭzas perdiĝon eternan, sed por la farinto havas efikojn malagrablajn, kiuj finfine lin purigas: "konforme al tio neniuj estaĵoj povas perdiĝi, sed ĉiuj neeviteble atingas la plej altan beatecon de la vivo, la plej altan scion kaj la perfektan manifestadon." (p. 195).

Dr. W. A. Verloren van Themaat (Amsterdam)

Ĉu estas vere ke la katolikismo malestimas la korpon? - de G. TAYMANS, elfrancisgis Fr. L. DE RUYVER, f.c.; eld. Fratoj de l'Kariatato, Bierbeek, 1962. 24 p. 21 × 13,5 cm.*

La libro volas montri ke tiuj, kiuj akuzas la Katolikan Eklezion pri malestimo de la korpo homa, malpravas. Troviĝas klarigoj de la

Katolika sinteno al Suferado, laboro, naturismo, kremaciado, ekster-nupta sekso, ktp. Papero kaj presado estas tre altkvalitaj.

Resumis: P. Kelton Groves (Londono)

Komentario pri la deklaro de la komunista partio de Usono, eld. Fremdlingva Eldonejo, Pekino 1963. 17 p. 18,5 × 13 cm.*

La ĉina Komunista Partio respondas al atakoj de la Komunista Partio de Usono pri la ĉina starpunkto rilate Kubon. Analizinte la usonan politikon kaj la historiajn rilatojn inter Ĉinujo kaj aliaj ŝtatoj, ĝi proponas kelkajn konsilojn al la usona Partio.

Resumis: Ulrich Lins (Köln)

De kie venis la malakordoj?

ĉefartikolo el "Renmin Ribao", eld. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1963. 36 p. 18,5 × 13 cm. Prezo: 1 st., 0,25 gld.*

"Renmin Ribao" respondas en tiu ĉi artikolo la atakojn fare de Thorez kaj aliaj francaj komunistoj kontraŭ la Komunista Partio de Ĉinio. Ĝi volas montri, kiu kontraŭas la Moskvan Deklaracion kaj Moskvan Deklaron, kiu eraras en sia politika linio, kaj kiu malkaŝis la malakordojn inter komunistaj partioj antaŭ la malamiko.

Resumis: KHO Khwat Liat (Londono)

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Kiu kion scias?, eld. Paco Esperanto-Rondo, Szeged, 1963. 16 p. 20 × 12 cm. 145 mallongaj demandoj pri Esperanto-movado k.a., kun solvoj.

Svensk Esperanto grammatik, de Erik CARLEN, eld. Eldona Societo Esperanto, Malmö, 1962. 94 p. 19,5 × 13 cm., bind.

Ĉu vi ŝatus orbitri? eld. Esperanto-Press, Oakville, Kanado, 1963. Demando — kaj respondo — ludo konsistanta el 58 presitaj kartoĵoj. Prezo 1,25 gld., 5 steloj.

El ĉina pentrarto, eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1962. 16 koloraj reproduktaĵoj, 26 × 19 cm., kun klarigoj kaj enkonduko. Nebinditaj, en kartona kovrilo.

Kroměříž, urbo, kiu festas 700-jarojn de sia daŭrado. Eld. Propagační komise oslav města při MěNV, Kroměříž, Ĉeĥoslovakio. Ilustrita faldfolio, 26 × 10 cm.

Signifo de la eŭratomo-organizo en la eŭropa unuigo, de Jean DETTWILLER. Eld. Centre d'études nucléaires de Grenoble, Esperanto-sekcio, 1963. 16 p. 28 × 22 cm., multobligita, kun unu mapo kaj resumo en franca lingvo. La unua en serio.

Esperanto Junul-kurso, suplemento, eld. SAT-Amikaro, Parizo 1963. 24 p. 24 × 15,5 cm. La suplemento ebligas uzi la "Junulkurson" koresponde. Prezo: 2,— gld. (8 st).

Jarlibro 1963, eld. Internacia Katolika Unuigo Esperantista. 84 p. 13 × 10,5 cm.

Laŭfake

Atomenergio

● La Esperanto-sekcio ĉe la ŝtata atomesploro en Grenoble, Francujo (vidu "Esperanto", 1963 p. 36) komencis serion de dokumentaj eldonaĵoj en la Internacia Lingvo. La unua konsistas el prelego donita de Ing. Jean Dettwiller ĉe la Kultura Semajno en Grésillon, 6.4.63.

Industrio

● Terminaro por la ŝufabriko industrio, "The Shoeman's Foreign Terms", nove aperinta en Anglujo, enhavas Esperantajn terminojn paralele kun anglaj, francaj, germanaj, hispanaj, italaj kaj nederlandaj. Eldonis Halford Publishing Co.

Muziko

● Kompanio en Britujo intencas eldonadi litografe diversajn novajn kantojn en Esperanto, modernajn kaj tradiciajn, laŭ abona sistemo. La kotizo estos ĉ. 24 ŝilingoj (48 st.) por 8 eldonoj en ĉiu jaro. La realigo de la plano dependas de sufiĉaj abonpromesoj. Adreso: Plan Stationers Ltd., Central Station, TUNBRIDGE WELLS, Kent, Anglujo.

Religio

● Ekaperis "Antaŭfonda Bulteno de la Unitara Universalista Esperanto-Societo", ofsete ĉe la Esperanto-Presejo en Ontario.

Studentoj

● STELO (Studenta Tutmonda Esperantista Ligo) organizis tendorestadon kun prelegoj kaj ekskursoj ĉe Primošten, Jugoslavio, 14-21 aŭgusto 1963. Informas SEK Zagreb, Amruŝeva 5/I, pf 213.

Turismo

● Ekde 1.3.63 la Turista Unuigo de Novi Sad (Jugoslavio) oficiale enkondukis Esperanton por la gvidado de turistoj.

Tra la Mondo

Brazilo

● Ekde 1963 la Fakultato de Filozofio, Universitato de Goiás, establis katedron de Esperanto, kiun direktos D-ro Carlos de Almeida Wutke. Estas tiu la unua universitato de Brazilo, kiu ĝis nun establis katedron.

● Devige Esperanto estas instruata en nova gimnazio en Curitiba, inter kies direktoroj troviĝas la verkisto Geraldo Mattos.


● Por 1965 aŭ 1966 estas planata en Belo Horizonte la Unua Tutamerika Kongreso de Esperanto, kun aparta renkontiĝo por universitatanoj.

Britujo

● En aprilo okazis en Dovro kun angla, franca, belga kaj germana partopreno la Dua Markola Kongreso kun la celo konatigi Esperanton en la havenurboj de la markolaj landoj. La tria kongreso okazos en Ostendo.

Ĉeĥoslovakio

● Fine de 1962 okazis kunveno de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato kun aktivistoj el la tuta lando kaj kun reprezentanto de ministerio. La kunveno decidis pli amplekse uzi Esperanton por politikaj, kulturaj kaj komercaj celoj.



● Radio Praha en esperanta elsendo la 28-an de februaro 1963 envicigis paroladon de d-ro J. Jermář, prezidanto de Ĉeĥoslovaka Esperanto-komitato, dediĉitan al la 85-a datreveno de S-ro Hugo Steiner, direktoro de Internacia Esperanto-muzeo en Vieno. Sur la foto de maldekstre: redaktoro F. Zajíček, d-ro J. Jermář, prezidanto de ĈSEK kaj Jana Čichová, prezidantino de Radio-komisiono de ĈSEK.

Finnlando

● Internacia studsemajno por infanoj kaj plenaĝuloj, kun saŭno, naĝado, kursoj kaj ekskursoj, okazos en Tampere ĉe naturparko kaj lago de 24 ĝis 29 junio 1963. Informas: Pispalanharju 13, Pispala-Tampere.

● En la Somera Universitato de urbo Lappeenranta ekde 1963 Esperanto estas regula fako. Studentoj de naŭstrunada ekonomio rajtas ekzameniĝi pri Esperanto por la unuagrada ekzameno, kaj por la duagrada ili devas koni la Esperantan terminaron de la fako. Instruistoj de Esperanto povas ekzameniĝi por diplomo de kapableco.

● Rezulte de 2-paĝa ilustrita artikolo en la semajna gazeto "Kultutaja" (242.000 abonantoj) aperos konstanta Esperanto-kurso en la sama gazeto ekde aŭgusto 1963.

Francujo

● El 90 partoprenantoj ĉe la Paska Kultura Semajno en Grésillon, 60 estis malpli ol 18-jaraj. Aŭdinte prelegojn pri retoriko, lingvistiko, atomenergio, oftalmologio, literaturo, k.a., ili povis sperti ne nur la facilecon de la Internacia Lingvo, sed ankaŭ la fakton, ke oni multon povas lerni per Esperanto. La aranĝo ricevis ŝtatan subvencion.

Germanujo

● Unuafoje la registaro aljuĝis la ordenon "Bundesverdienstkreuz am Bande" pro laboro por Esperanto: nome al S-ro Hans Tressel, Honora Membro de UEA kaj Delegito en Munkeno.

Gvatemalo

● La Gvatemala Registaro, laŭ decido de la 8-a de majo 1962, permesas al la Esperanto-Asocio de Gvatemalo gvidi kursojn de Esperanto en ĉiuj duagrada lernejoj de la ĉefurbo. Lernantoj povas elekti inter Esperanto, angla kaj franca lingvoj. La instruado de Esperanto havas eksperimentan karakteron dum la daŭro de 3 jaroj. Komisiono elektis kiel oficialan lernolibron "Sabe Ud. Esperanto?" de Jorge Hess, eld. Argentina Esperanto-Ligo.

Hindujo

● Arĉarĵo Vinoba Bhave antaŭnelonge vizitis la Universitaton ĉe Ŝantiniketan, kaj tie akceptis ekzempleron de "Malsata Ŝtono" el la manoj de ĝia tradukinto, Lakshmiswar Sinha.

Pollando

● Librojn el eksterlando, inkluzive Esperantajn, oni nun povas mendi en ĉiuj libro-importejoj.

Senegalio

● En ĵurnalo "Dakar-Matin" (franc-lingva) aperis bone verkita artikolo de S-ino Potin, listinganta la atingojn de Esperanto kaj heroldanta la Karavanon de Amikeco, kiu siatempe vizitos ankaŭ Senegalion.



S O F I O 3-10 VIII 1963

Sub la Honora Protektado de Georgi Trajkov, Unua Vicĉefministro. Konstanta Adreso: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, Nederlando.

OFICIALAJ KOMUNIKOJ

N-ro 15

Rotterdam, la 22-an de aprilo 1963

Fervojaj rabatoj.

Krom la jam anoncitaj landoj (Aŭstrujo, Bulgarujo, Hungarujo, Svisujo) ankaŭ la Fervojo de Grekujo donas al la partoprenantoj en la 48-a U.K. rabaton de 25% je aĉeto de revenbileto kaj je monstro de la Kongresa Karto.

La Fervojo de Francujo donas rabaton de 20%.

Valutaj leĝoj en Bulgarujo.

La enportado en Bulgarujon kaj elportado el Bulgarujo de bulgara valuto estas malpermesita. La enportado de alilandaj ĉekoj kaj mono en Bulgarujon estas permesita sen limigoj je la kondiĉo, ke la sumo kaj la speco de la enportata mono estu avizita ĉe la limo, por ebligi ĝian postan elportadon. La elportado de ĉekoj kaj de mono alilanda el Bulgarujo, kiuj ne estas avizitaj ĉe la enportado, estas nepermesita.

Infana Kongreseto.

La Loka Kongresa Komitato atentigas ke post la 30-a de junio absolute ne plu eblas akcepti aliĝojn al la 8-a Internacia Infana Kongreseto. Ĝi sekve instigas ĉiujn interesigantojn aliĝi kiel eble plej frue.

N-ro 16

Rotterdam, la 30-an de aprilo 1963

Grava

La ĝojiga fakto ke tiel grand-nombre alvenis ĝis nun la aliĝoj al la 48-a U.K., devigas la Lokan Kongresan Komitaton antaŭvidi ke la partoprenantoj estos pli ol 3000. Bedaŭrinde en Sofio ne troviĝas teatro, kiu povas enteni tiom da personoj kaj pro tio L.K.K. estas devigita informi ke la kongresanoj, kies numero estas pli alta ol 3000, ne havos la eblecon

en Sofio ĉeesti la du oficialajn teatrajn prezentadojn, kiuj okazos la 5-an kaj la 7-an de aŭgusto.

La nombro de la ĉeestantoj de ĉiu alia arta programero ne estas limigita.

Ĉiu aliĝinto kun kongresa numero pli alta ol 3000 ricevos respondilon, kiu estas resendenda al la konstanta adreso de la Kongreso, per kiu li/ŝi akceptas aŭ malakceptas la menciitan kondiĉon. En kazo de malakcepto la pagita aliĝkotizo estos redonita.

Konfirmo Loĝado.

Pro la ne tro rapidaj poŝtaj ligoj inter Bulgarujo kaj eksterlando, la ricevo de la konfirmilo pri la loĝado en Sofio okazas plej ofte kun prokrasto de pluraj semajnoj.

La mendintoj bonvolu tion konsideri.

Enirvizo.

Tiuj personoj, por kiuj estas malfacile persone viziti bulgaran diplomatan reprezentanton, povas peti la enirvizon per letero.

Oni devas unue peti specialajn formularojn, kiujn oni resendu, plenigitaj, kun la pasporto, du fotoj, kongresa karto kaj la egalvaloro de \$ 1,50.

Loĝado en Sofia.

La Loka Kongresa Komitato informas ke estas absolute neeble aranĝi tranoktadon por tiuj kongresanoj, kiuj alvenos en Sofio sen antaŭe esti mendintaj kaj pagintaj sian loĝadon. Por ke oni ne devu mem serĉi liberan ĉambron en nekonata urbo, L.K.K. varme rekomendas mendi la loĝadon antaŭ ol alveni en Sofio.

Cseh-Seminario. La 30-a de junio 1963 estas la limdato por aliĝo al la Seminario por Cseh- metodaj instruistoj, kiu okazos en la kadro de la 48-a U.K. La aliĝkotizo estas 12.— ned. gld.

Por ke ĉiu interesiganto havu la eblecon partopreni la Seminarion, ni konsilas atenti la menciitan limdaton.

Tendumejo.

Ni informas la interesigantojn ke en aŭ apud Sofio ne troviĝas tendumejo. Oni eventuale povas libere tendumi ekster la urbo, sed tio estas je propra respondeco.

N-ro 17

Rotterdam, la 20-an de majo 1963

Fervojaj Rabatoj.

La Ministerio pri la Bulgaraj Fervojoj sendis novan cirkuleron al ĉiuj fervojaj instancoj en Eŭro-

po por informi pri ĉiuj fervojaj rabatoj por kongresanoj. La cirkulero portas la numeron 5-52-10 kaj la daton de la 18-a de majo 1963. Oni citu tiun cirkuleron, se en vojaĝoficejo oni montras sin neinformita.

Speciala vagonaro post la kongreso.

LKK estas aranĝanta specialan vagonaron de Sofio al Beograd en la posttagmezo de la 10-a de aŭgusto por tiuj, kiuj devas tranokti tie por kapti vagonaron hejmen la morgaŭan matenon. Interesitoj bonvolu anonci sin plej malfrue ĝis la 20-a de julio.

Limdato aliĝado en Sofio.

LKK decidis ke aliĝoj pagitaj al Sofio povos esti akceptitaj plej laste ĝis la 20-a de junio 1963. Por aliĝoj pagitaj al Rotterdam la lasta limdato restas la 30-a de junio 1963.

Loĝado kaj ekskursoj.

LKK ne povas garantii la plenumon de mendoj pri loĝado kaj ekskursoj, kiuj alvenos post la 10-a de julio 1963. Oni nepre sendu siajn mendilojn kiel eble plej baldaŭ.

Konkurso dum la balo.

Dum la Oficiala Balo oni aljuĝos premion por la plej pitoreska nacia kostumo.

Fotokonkurso.

Oni ensendu siajn konkursaĵojn kiel eble plej baldaŭ; la limdato estas la 20-a de julio. Por la reguloj vidu "Esperanto" de marto kaj aprilo 1963. La unua premio konsistas el fotoaparato!

Statistiko (ĝis 20.5.63):

Arabujo 1, Argentino 2, Aŭstralio 5, Aŭstrujo 31, Belgujo 49, Brazilo 2, Britujo 95, Bulgarujo 757, Ĉeĥoslovakio 5, Danlando 69, Finnlando 49, Francujo 290, Germana Fed. Resp. 115, Germana Dem. Resp. 54, Hispanujo 9, Hungarujo 97, Irlando 2, Islando 2, Israelo 5, Italujo 206, Japanujo 6, Jugoslavio 50, Kanado 3, Kenjo 1, Madagaskaro 1, Maroko 2, Meksiko 4, Monako 3, Nederlando 128, Nigerio 2, Norvegujo 13, Nov-Zelando 5, Pollando 307, Rumanujo 5, Sovetunio 48, Svedujo 165, Svisujo 19, Usono 17, Vjetnamio 1.

Entute 2624 el 39 landoj.

Konstanta Kongresa Sekretario
G. G. Pompilio

LASTA NOVAĴO

En la momento de ekpresigo la nombro de la aliĝintoj al la 48-a U.K. atingis la ciferon
2 8 2 4

Nepre legu la avertojn!



o La Ministro pri klerigo kaj kulturo de PR Bulgario — S-ro GANĈO GANEV akceptis esti Honora protektanto de la Kongreso.

o CENTRO TRADUZIONI E SERVIZI DI CONGRESSO, laŭdire la plej kompleta eŭropa organizaĵo pri interpretado kaj teknika priservo de internaciaj kongresoj, serioze!? proponis al ni organizi per siaj teknikaj rimedoj kaj spertaj interpretistoj samtempan interpretadon en kelkaj lingvoj ĉe la kongresaj laboroj.

Ni rapidas diskonigi tiun "trafan" proponon ĉar eventuale ankaŭ aliaj Esperanto-kongresoj ŝatus profiti la helpemon de la afabla organizaĵo. Estus bedaŭrinde, se ili ne antaŭvidus en siaj buĝetoj sumojn por la teknika interpretado.

o La kongresajn kulturajn programojn partoprenos interalie: vira okteto el Ljubljana, skota kantgrupo el Glasgovo, du japanoj, plenumontaj tipan japanan flutoludadon kaj la konata esperantista kabaredo "Verda simio" el Varsovio.

o En preparo estas "Angulo de ekstereŭropa kulturo", kiu devas kontribui al la kongresa etoso kaj garantii ĝian plenan universalecon, ankaŭ ĉe la foresto de reprezentantoj de foraj landoj. Samideanoj, kiuj pretas kontribui per taŭga materialo: fotoj, libroj, objektoj de la nacia arto, diapozitivaj, sonbendoj, informoj pri la kultura vivo en la respektivaj landoj en Afriko, Ameriko, Azio kaj Aŭstralio estas petataj tuj kontakti la Kongresan Komitaton aŭ la Estraranon de TEJO pri kulturaj aferoj — S-ro Svobodan Zlatnar, LJUBLJANA, Rimska 7, Jugoslavio.

o Dum la tuttaga ekskurso, la kongresanoj havos la eblecon viziti... pardonu... vidi ankoraŭ unu landon — Rumanio kaj ankaŭ meti piedon sur esperanta teritorio — insulo Esperanto en Danubo.

o Ĉu vi jam mendis kvanton de la Junulara Glumarko ĉe la Libroservo de UEA? Prezo: 0,30 ned. guld. por unu folio de 10 pecoj.

o La Kongresan Komitaton atingis pluraj demandoj pri la Unuaj oficialaj Esperanto-sportludoj. Ĉu vi jam decidiĝis partopreni? Skribu al ni en kiu disciplino ni devas vin enlistigi!

o La unuajn premiojn de la Kongresa Komitato gajnis S-ro Nikola Pilev el VARNA — kongr. N-ro 50; S-ino Beate Neumann el GDR — N-ro 100; S-ro Juli Penkov el SOFIO — N-ro 150 kaj S-ro Polarczyk Wacław el KATOWICE, Pollando — N-ro 200.

Statistiko: Ĝis la 10 IV 1963. Aŭstrujo — 3, Britujo — 9, Bulgarujo — 99, Danlando — 2, Germanujo/GDR — 32, Germanujo/GFR — 6, Hungarujo — 2, Italujo — 1, Japanujo — 2, Jugoslavujo — 2, Nederlando — 1, Norvegujo — 1, Pollando — 59, Svedujo — 5, Usono — 1. Entute 225 el 15 landoj.

Anoncis sin 16-membra karavano el LENINGRAD, Sovetunio.

Kongresa Komitato
Korespondadreso:
JUNULARA KONGRESO,
Sofio, p.k. 587, Bulgario

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝo

Behrmann. Je 29.4.63 al S-ino Almut kaj S-ro Hermann Behrmann, delegito en Walsrode, Germanujo, naskiĝis filino Iris.

Jubileo

Koch. S-ro Hans Koch, Prezidanto de la Germana Esperanto-Instituto kaj estro de la ekzamenaj komisionoj, festas la oran jubileon de sia aktivado kiel Vic-Delegito en Munkeno. Varmajn gratulojn pro tiu fidela servado al UEA!

NEKROLOGO

Sinner. Majoro Oskar Sinner mortis la 17-an de marto post longa sufero. Li estis malnova membro de UEA, delegito de 1950 kaj ĉefdelegito por Aŭstrujo. Li estis 80-jara.

Pomakov. En Sofia je 16.12.62 forpasis D-ro Anton Markov Pomakov, kuracisto kaj verkisto, kaj malnova Esperantisto.

Peĉigargov. Je 2.3.63 forpasis 70-jara en Sofia Ing. Kosta Ivanov Peĉigargov, Esperantisto depost 1908 kaj kunlaborinto de I. H. Krestanov.

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por tempoj kaj ondlongoj vidu la aprilan numeron.

Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Radio Roma. 4-VI, Tra la literaturo; 7-VI, Michelangelo kaj Raffaello en la Siksta Kapelo; 11-VI, Novaĵoj el Italujo; 14-VI, Italujo kaj fremdaj verkistoj: Elisabeth Barrett Browning; 18-VI, Italaj kanzonoj en Esperanto; 21-VI, Novaj sanktuloj: Sankta Vincenzo Pallotti; 25-VI, Leterkesto; 28-VI, La itala poeto Gabriele d'Annunzio. Krome, ĉiun merkredon, Kuriero de Esperanto. Prelegantoj: S-ro Luigi Minnaja kaj Prof. D-ro Vincenzo Musella.

Horsistemoj.

Kompleta tabelo de la esperantlingvaj dissendoj regule aperas en la januara, aprila, julia kaj oktobra numeroj de la revuo. Tempoj estas indikataj laŭ la horsistemo de Greenwich (G.M.T.). Jen la korektoj farotaj por transskribi ilin en lokajn tempojn de kelkaj landoj:

Aldonu	1	horon	:	ĉiuj eŭropaj landoj ne menciataj sube, Alĝerio, Tunizio, Ekvatora Afriko, Angolo.
"	2	horojn	:	Bulgarujo, Finnlando, Grekujo, Rumanujo, Turkujo, Libio, Israelo, Libano, Sirio, Egiptujo, Sud-Afriko, Rodezio, Sudano.
"	3	"	:	Sovet-Unio (eŭropa parto), Irako, Kenjo, Madagaskaro, Etiopio.
"	3½	"	:	Irano.
"	5	"	:	Okcidenta Pakistano.
"	5½	"	:	Hindujo, Cejlono.
"	7	"	:	Kamboĝo, Laoso, Tajlando.
"	7½	"	:	Indonezio, Malajo.
"	8	"	:	Orienta Ĉinujo, Vjetnamio.
"	9	"	:	Japanujo.
"	10	"	:	Orienta Aŭstralio.
"	12	"	:	Nov-Zelando.
Forprenu	1	horon	:	Islando, Kanariaj insuloj.
"	3	horojn	:	Argentino, Brazilo, Urugvajo.
"	4	"	:	Ĉilio, Paragvajo, Bolivio, Orientaj Kanado kaj Usono.
"	4½	"	:	Venezuelo.
"	5	"	:	Ekvadoro, Kolombio, Peruo.
"	6	"	:	Gvatemalo, Meksikio.
"	10	"	:	Alasko, Havajo, Tahiti.

Neniu korekto por Maroko, Madejro kaj Okcidenta Afriko.

Junio

- 1-3 Beneluksa Kongreso, Ant-verpeno
 1-3 Franca Kongreso, Perpignan.
 1-8 Int. Junulara Kunveno de GEJ, Nigra Arbaro
 15 Nova limdato por CED-Enketo (p. 89)
 24-29 Int. Studsemajno, Tampere
 30 Limdato aliĝo UK Sofio
 30-15/9 Kursoj, ferioj ĉe Grésillon

Julio

- 1-20 Feria Kurso por Esperanto-instruistoj, Gdańsk
 5-7 Usona Kongreso, Pittsburgh
 6-10 Hungara Somera Universitato, Gyula
 15-28 Somera Tendaro, Lančov, Ĉeĥoslovakio
 20 Limdato foto-konkurso U.K.
 20-26 SAT-Kongreso, Hamburg
 21-25 Pola Kongreso kaj Seminario "Oriento-Okcidento", Szczecin
 21-28 Feriaj kursoj, Helsingör
 25-28 Hispana Kongreso, Barcelona
 25-1/8 KELI-Kongreso, Graz
 27-3/8 TEJO-Kongreso, Vraca
 28-1/8 Lerneja Konferenco, Beograd
 28-1/8 Antaŭkongresaj Ferioj, Vieno
 29-11/8 Dua tendaro ĉe Lančov
 31 Limdato konkurso Comella-Bassols

Aŭgusto

- 3-10 Universala Kongreso, Sofio
 11-19 Int. Ferio-semajno, Krommenie
 14-21 STELO-semajno, Primošten
 23-25 50-a Japana Kongreso, Osaka

Septembro

- 1-7 Int. Ferio-semajno, Solothurn
 14-19 Itala Kongreso, S. Vincent
 14-21 Ferioj en "De Leemkule", Nederlando

OFICIALA INFORMILO

N-ro 358

La 1-an de Majo 1963

Aŭstrujo

ĈEFDELEGITO: vakas.

Germanujo

NOVA ĈEFDELEGITO: S-ro G. Feis, 6603 Sulzbach, Altenwald, Hauptstr. 70, (ekde 1-7-1963).

Al S-ro Friedrich Helfers kiu jam dum pli ol 10 jaroj plenumis la oficon de Ĉefdelegito, la plej sincerajn dankojn kaj bondezirojn de UEA.

Sudafriko

ĈEFDELEGITO: vakas.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Maddern, S-ro Ivan T., Morwell, Aŭstralio.

Nikolov, S-ro Nikola, Sofio, Bulgarujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1963

418. Grahovac, S-ro Ilja, Fitzroy, Aŭstralio; 419. Hall, S-ro M., Cremorne, Aŭstralio; 420. Harry, S-ro Ralph, Forrest Canberra, Aŭstralio; 421. Kosutek, S-ro Josef, Sydney, Aŭstralio; 422. Albuquerque, S-ro D-ro José J. de Maceio, Brazilo; 423. Melo S-ro Roskildes Pereira de, Manaus, Brazilo; 424. Higham, S-ro W. H., Southport, Britujo; 425. Morton, F-ino H. R., London, Britujo; 426. Stott, S-ro K. A., Stockport, Britujo; 427. Klitidis, S-ro Stelio, Nikozia, Cipro; 428. Møller, S-ino Ellen, Vester Nebel-

Danlando; 429. Guillot, S-ro Jean-Paul, Poitiers, Francujo; 430. Mailard, D-ro Jean, L'Hay les Roses, Francujo; 431. Moreau, S-ro Marcel, Libourne, Francujo; 432. Grabau, S-ino Maria, Hamburg, Germanujo; 433. Sgroi, S-ro Rag. Rosario, Catania, Italujo; 434. Viti, S-ro Giulio, Roma, Italujo; 435. Veenstra, S-ro H., Amsterdam, Nederlando; 436. Nesje, S-ro Hans, Aalesund, Norvegujo; 437. Hall, S-ro W. J., Palmerston North, Nov-Zelando; 438. Hardick, S-ro N., Cape Town, Sudafriko.

DONACIOJ AL LA ĜENERALA KASO

C. J. Jahn, 13,05 gld., Willy Jacob 6,30 gld.

FONDAJO PROF. CANUTO

S-ro Anton Ohme I MA.

Ĉiuj kontribuu por membrigi esperantistojn en nepagipovaj landoj, honore al la nobla prezidinto de U.E.A. (vidu dec. no. "Esperanto", 1960).

POR VASTIGO DE LA AGADO

Fino Clementina Franqur, Hispanujo 12,50 gld., S-ro Gunnar Spant, Usono 19,32 gld.

Entute ricevita: 13.910,77 gld.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktoro C.O.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1963

Stato je la 30-a de aprilo

Konkurso I

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Finnlando	2570	2725	106,03
2. Britujo	6368	5754	90,36
3. Francujo	7225	6524	90,30
4. Svislando	2141	1920	89,68
5. Belgujo	1695	1520	89,68
6. Nederlando	5068	4195	82,77
7. Italujo	4220	3460	81,99
8. Svedujo	6640	5290	79,67
9. Hispanujo	2696	2140	79,38
10. Usono	4110	3060	74,45
11. Brazilo	3856	2819	73,11
12. Danlando	2936	2045	69,65
13. Germanujo	7221	4575	63,36
14. Japanujo	3240	1975	60,96

15. Norvegujo	1755	1060	60,40
16. Jugoslavio	5180	1410	27,22

Konkurso II

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Aŭstralio	1233	1220	98,95
2. Portugalujo	515	465	90,29
3. Kanado	769	672	87,39
4. Islando	250	195	78,—
5. Madagaskaro	250	169	67,60
6. Aŭstrujo	1475	885	60,—
7. Israelo	300	145	48,33
8. Nov-Zelando	1167	530	45,42
9. Argentino	905	220	24,31
10. Sudafriko	250	60	24,—
11. Urugvajo	250	55	22,—

Vidu la regulojn sur paĝo 26 (Febr. 1963).

ANONCETOJ

AVERTO - Nek la redakcio, nek UEA iel ajn respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, aŭ pri plenumado de promesoj faritaj en ili. Tio aparte koncernas poŝtmarkokolektantojn.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejoj) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA (adreso: K.S.M., 12, rue des Jacobins, Clermont-Fd (PdD) Francujo) kiu peras adresojn laŭ la regularo aperinta en Jarlibro 1963-a.

Senlanda lingvo aŭ internacia nacio? Kien Esperanto? Artikolojn volonte verkos D. Soleo, 14 B Castle Avenue, Dover, Britujo.

Dudek gekursanoj diversaĝaj kaj diversprofesiaj deziras korespondi kun la tuta mondo. Skribu al la instruanto: Inĝ. arĥ. Petar Nikolvski, Dj. Djakoviĉa 5, Kumanovo, Jugoslavio.

Rogério Pereira, caixa postal 997, Lourenço Marques, Mozambiko, fraŭlo, deziras interkorespondi kun fraŭlinoj de Eŭropo pri kampismo.

K. H. M. Sumathipala, "Prabath", Aruppola, Kandy, Cejlono, deziras korespondi kun tuta mondo.

Feria urbo Kosmos, internacia

renkontejoj por homoj kun intereso pri objektiva vivkoncepto. Petu senpagan, ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

Düsseldorf, (Germanujo) eldonis Esperanto-prospekton. Sukceso ripetigos, se vi skribos multnombre esperant-lingve al: Werbe- und Verkehrsamt Düsseldorf. Indiku privatan motivon kial vi bezonas la prospekton!

Joel M. Soares, Caixa Postal 182, Campos, Estado do Rio de Janeiro, Brazilo, 36-jara, deziras korespondi kun ĉiuj landoj, en Esperanto, angla aŭ portugala lingvoj, per leteroj aŭ ilustritaj p.k., kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, gazetojn kaj aliajn interesaĵojn.

Brasília — La nova Brazila ĉefurbo vin vokas! Gekorespondantoj de ĉiuj aĝoj kaj intereso. Skribu al: Esperanto-Asocio de Brasília — Av. W-3, Quadra 6, Lotes 12/14, Brasília — Brazilo.

Agu! Aktivuloj petu: Novan varbmetodon, 5: Avangardo-aligilon, 2, kune 6 respkup. Esperanto-Propagando. Svedujo, Lund, pfako 212.

Henrique Setas, 30-jara fraŭlo, Av. Pinheiro Chagas, 2469, 2º, nº 1, Lourenço Marques, Mozambiko, dez. kor. k.ĉ.l. kun vegetaraninoj 20-25-jaraj kun ebleco al edziĝo.

Flugantaj teleroj. Informojn kaj presraportaĵojn pri neidentigitaj

flugaĵoj bonvole sendu al: C. J. Tucker, Oriel College, Oxford, Anglujo.

Oni luas vilaojn aŭ somerdomojn je 60 metroj de la maro, strandon de Denia (Alicante-Hispanujo), kun tri ĉambroj, manĝejo, enirejo, korto, kuirejo, duŝejo, akvo, lumo kaj komplementaj servoj, "butana" gaso, glacia ŝranko, meblaro kaj litoj por sep personoj. Po 5.000 pesetoj monate. Estas rivero je 200 metroj por fiŝkaptado; rizkulturado je kilometro kun ĉasado. Trankvila loko. Oni vendas la samajn vilaojn sen meblaro por 110.000 pesetoj. Skribu aŭ vizitu S-ron V. Pedro Signes-Monjas Clarisas, 20 Oliva (Valencia)-Hispanujo.

Fibrolandia asbestocementaj artikloj. Ni bezonas katalogon de ĉiuj fabrikoj de asbestocemento. Ni pagas per argentinaj neuzitaj poŝtmarkoj aŭ alimaniere laŭ indiko. C.C. 2272 C.C. Buenos Aires, Argentino.

Serĉas metalfadenojn por magnetofono: Yelland, Aspremont, A. M. Francujo.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Frits Thasler, (839) Passau/Ndb, Grūnastr. 23, Germanujo.

Nur interstene korespondas D-ro F. Mascanzo, ni via Calefati 28 Bari (Italujo) (Itale)

ŜAKA RUBRIKO


Gvidas D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio
Nia konkurso 1963

Problemo n-ro 29 (Konkurso 1963 — n-ro 5)

A. Anderssen

Mato en 3 movoj. Pro ĝusta solvo 3 poentoj.

Kontrolo: Blanko: Rh6, Tc4, Ka2, Kd4, Cf8, p. d6, g4



8 Nigro: Rf6, Kc 8, Cb8, Ce5, p.: d7, e6

7 Solvojn sendu ĝis 30.9 al la gvidanto de la rubriko.

6 La ŝakistoj certe rimarkis, ke la bildo por problemo 28 (maja "Esperanto") estas malĝusta, pro kio pardonpetas la redaktoro. Tamen la kontrola teksto estis tute ĝusta, kaj per ĝi la legantoj povis ankorau konstrui kaj — eble — solvi la problemon!

2 La rezultoj de la konkurso 1962 aperos en la juli-aŭgusto eldono 1 de "Esperanto".

GRAVEGA AVERTO

Ankoraŭfoje ni atentigas, ke aliĝoj al la 48-a U.K. kun pago al Rotterdam absolute ne estos akcepteblaj post la 30-a de junio 1963. Aliĝoj kun pago al Sofio ne povos esti akceptitaj POST LA 20-a DE JUNIO. Pro la grandega nombro de partoprenantoj estos maleble administre kaj organize prizorgi aliĝojn post tiu dato. Ni apelacias al ĉiuj, nepre observi tiun regulon, ne malfruiĝi, kaj — se tamen malfruiĝinte — ne plendi aŭ koleri pro malakcepto.

Ni eksciis, ke en pluraj landoj, precipe en orienta Eŭropo kaj en Bulgarujo mem, individuaj personoj kaj eĉ tutaj grupoj, ne aliĝinte al la Kongreso, tamen intencas vojaĝi al Sofio, esperante ke, jam estante en Sofio, ili estos tamen akceptitaj. Per tia agado oni povas nur fuŝi la kongreson por si mem kaj por la aliaj kongresanoj. Estu tute klare: kiom ajn da kilometroj oni estos vojaĝinta, sen kongreskarto neniuj povos eniri la kongreson. La kongresaj salonoj ne estas elastaj kaj ne povos digesti lastmomentan invadon de nealiĝintoj. Ĉe ĉiuj pordoj okazos severa kontrolo de la karto.

ESPERANTO-REVUO ILUSTRITA

Speciala Antaŭkongresa Propono !

LA ESPERANTO-REVUO ILUSTRITA, plena de bildoj kaj teksto pri la naturista vivado tutmonda, estas nun akirebla por ĉiuj samideanoj, per membreco aŭ per nura abono, dumvive aŭ jare.

La bele kaj riĉe ilustrita revuo "Naturista Vivo" estas la oficiala organo de INFE (Internacia Naturista Fakgrupo Esperantista), kiu pasintjare fariĝis kunlaboranta faka asocio de UEA.

Ekde la 1-a de julio 1963 la membreco (inkl. abono) estos dumvive \$ 52.50, unujare \$ 2.63. Nure abono estos dumvive \$ 45.00, unujare \$ 2,25.

Speciala A n t a ŭ kongresa Propono:

Unujare: Havu membrecon (inkl. abonon) por la prezo de nura abono, \$ 2.25,
aŭ havu abonon por nur \$ 2.00.
Krome, la pagita unu jaro senkoste al vi etendiĝos ĝis la fino de 1964 !

Dumvive: Vi havos membrecon (inkl. abonon) por la duona prezo, nur \$ 26.25. (por
tio-ĉi, virino sola pagas nur \$ 13.13)
aŭ vi havos abonon por nur \$ 22.50.

(egalvaloraj monbiletoj de ĉiuj landoj, aŭ poŝtmandato, ĉeko, k.a. estas same akcepteblaj)

Profitu de la propono !

Aliĝu aŭ abonu TUJ !!!

Sendu monon aerpoŝte rekte al la kasisto aŭ pagu ĉe UEA.

**INFE-sekretario/kasisto Leif Heilberg, 1801 Page Street, San Francisco 17, California,
USONO.**

VI DEVAS LEGI:



*Frida Christaller:
Patrino kaj infano*

"Monda Kulturo" estas
via kulturo kaj nia
kulturo !

Sekvu ĝian evoluon !

Jarabono:
15 gld., 60 st.


- "Mariza" kaj "Bulgaroj en Venecio" de Sen Rodin — sociaj noveloj pri konfliktoj de hodiaŭaj gejunuloj kaj pri interpopola amikeco.
- La plej novajn poemojn de William Auld.
- Mezazian legendon rerakontitan de Petro Poliŝĉuk.
- Ilustritan studon de Száthmari pri la ĵus mortinta pentristo Péter Illéssy.
- La "Inferiro de Iŝtar" — asira-ŝumera mito reversita laŭ eposa metriko de Kolomano Kalocsay, kun komentario.
- Poemdebuto de Nassif Isaac.
- Novelon de Victor Sadler sur azia fono, plus du poemoj.
- Jubilean artikolon pri la 80-jara estona poetino Marie Under, kun specimenoj el ŝia sensema poemaro.
- Recenzojn pri la lastaj STAFETO-eldonaĵoj: romano de Schwartz kaj la Zamenhof-biografio de Marjorie Boulton.
- Bibliografion de la originala Esperanta romano. Ĉu vi scias, kiom da romanoj estas verkitaj en la Internacia Lingvo ?
- Kaj ankoraŭ tri skulptaĵoj de Frida Christaller, du karikaturaj de Beltrán, k.a.

en la printempa

MONDA KULTURO

RAKONTOJ de OOGAI

MORI Oogai



Serio
Oriento-
Okcidento
N-ro 2

Tola bindo
10,25 gld.

KVAR BRILAJ NOVELOJ

en kiuj Oogai montras per diversaj temoj,
kontraŭ diversaj historiaj kaj geografiaj fonoj
sian majstran rakontistan talenton. La japa-
naj etiko, homeco kaj arto vivas en ĉi tiuj
paĝoj.

Tuj mendu ĝin ĉe la Centra Oficejo
Sola vendrajto ekster Japanujo: UEA.

en la Junulara Jaro

uzu la belan
trikoloran
glumarkon de
TEJO: po 0,30 gld.
(1,2 st.)
por 10 markoj.



SENPAGAN VOJAĜON AL TENERIFO

ricevos ĉiu kiu vizitas nian terenon "Vista
Panoramica" sur la rava insulo kaj decidas
konstrui dometon. Germanaj spertaj inge-
nieroj konstruas por vi laŭdezire de la
malmultekosta Bangalo ĝis la plej luksa tipo.


Internacia atmosfero! Belega klimato!
Prospektojn kaj detalajn informojn peras:

S-ro Tadros Megalli

8191 Münsing am Starnberger See, Germanujo

Aperis la lasta manuskripto de

D-ro L. L. Zamenhof



FABELOJ

(kvara volumo) de H. C. Andersen
(tradukis: D-ro L. L. Zamenhof)

244 paĝoj — 53 originalaj ilustraĵoj de
A. Uniechowski

Prezo: 3 \$ aŭ egalvaloro
(plus 10% por sendkostoj)

Eldonis: Heroldo de Esperanto (Bruselo)
Mendu ĉe via Libro-Servo aŭ ĉe UEA